

LEGOLIBRETO I.

por karaj amikoj

Ni preparis tiun ĉi legolibreton, ĉar ni sentis bezonon oferti al niaj geamikoj ion por legi kaj ĝui nian lingvon. Ĝi povis aperi nur helpe de lernantoj de Jindřiška, kiuj fakte jam superis ŝin kaj instruis ŝin, kuraĝigis ŝin labori komputile. Kaj danke al amikoj, kiuj favore akceptis ŝin en Esperantujo kaj malfermis al ŝi mondon kaj siajn korojn.

La legolibreto ne pretendas ian profesion, pedagogian sperton, nur volas doni ion por legi kaj amuzi. En ĝi povas trovi ion komencanto, progresanto, ankaŭ eble eĉ spertulo. Certe oni povas trovi eĉ preserarojn, pri kiuj, kara leganto, skribu al ni.

Jindřiška Drahotová

Miroslav Vaněk

Ĉeĥio, 2001

www.mladaboleslav.cz/esperanto

drahotova@esperanto.cz

vanekmi@centrum.cz

Kial oni mensogas

Pri tio rakontas malnova ĉina fabelo.

Fabelojn ŝatas homoj sen diferenco de la aĝo.

Fabelojn ni rakontos vin en Ĉeĥa paradizo en vilaĝo Skokovy.

Nun ni diros al vi nur la saĝan finon de la ĉina fabelo:

La homoj mensogas pro amo.

La homoj mensogas pro timo.

La homoj mensogas pro profito.

En Skokovy ni trovis la kvaran kialon, kial homoj mensogas:

Por amuzi, por ridi.

Tri artikoloj el JUNA AMIKO – internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejanoj kaj komencantoj junaamiko@esperanto.hu

Humuraĵo el kolekto de Dieter Berndt

La telefono eksonoris. Malgranda Paŭlo prenis aŭdilon kaj diras: „Paĉjo ne estas hejme, ankaŭ panjo ne estas. Estas ĉi tie nur mi, avino kaj kato. La avino malbone aŭdas, kato ne parolas kaj kun mi vi parolu nur esperante. Ĝis!“

De kie devenas la nomoj de valutoj?

Komuna valuto de Eŭropa Unio *EŬRO* videble devenas el la nomo de kontinento Eŭropo. Sed de kie venas aliaj nomoj? Estas interese iom „detektivi“.

Kelkaj nomoj devenas de la bildo sur iu flanko (averso / reverso) de la monero. Plej konata estas *KRONO*, simbolo de reĝa potenco, ekzemple en Ĉeĥio, Slovakio, Danio, Norvegio, Svedio... Reĝan potencon simbolis ankaŭ leono sur ŝildoj de militistoj. Rigardu rumanan *LEI* kaj bulgaran *LEVO*. La portugala *ESKUDO* signifas ŝildon. La monero ofte surhavas krucon, simbolon de kristanismo. De tio devenas nomo de brazila *KRUZEJRO*, aŭ malnova aŭstra *KREJCERO*. Ofte portreto de la reĝo ornamis moneron. Jen la deveno de la hispana *REALO*, ekzemple.

Nomo de la mono venas de oro, el kiu komence oni monerojn faris, aŭ de la marko, kiu atestis pri konstanta valoro de la metalo: *ZLOTO* en Pollando, *GULDENO* en Nederlando, *AŬRO* en Islando, *MARKO* en Germanio kaj Finnlando.

La ganaa *CEDO* signigas konkon – iama pagilo.

Mono ricevas sian nomon de la landonomo, kiel ni jam vidis ĉe *EŬRO*: *FRANKO* en Franklando, *SOMALO* en Somalio, *MONGO* en Mongolio, *BOLIVANO* en Bolivio ktp.

La nomo povas ankaŭ montri pezon de la metalpeceto, kiel ekzemple itala *LIRO* kaj brita *PUNDO*, same hispana *PESETO*.

Fine, *TALERO (DOLARO)* sian nomon ricevis de la germana produktoloko en la 16-a jarcento: *Joachimsthal*. La signifo de la vorto talero: aĵo el Joachima valo.

Ĉu vi scias de kio venas la nomo de via mono? Se jes, skribu al ni. Ni tre scivolas.

Zoltan Kurucz, Hungario..

El ludilo medicina instrumento

Hipokrato rimarkis, se li alpremas oreilon al la brusto de malsanulo, li povas bone aŭdi batadon de la koro. Dum du mil jaroj medicinistoj nenion ŝanĝis kaj esploris korojn kiel li.

Sed en la jaro 1816 profesoro de medicina fakultato en Parizo René-Teophile-Hyacinthe Laënnec ekhavis ideon, kiun donis al li la hazardo. Sur la strato li vidis ludi knabojn kun tubo. Ili frapetante ĉe unu ekstremo sendadis signalon unu al la alia. La tubo bone kondukis brueton. Laënnec ekmeditis kaj tuj ĉe unua malsanulo volvis tubon el paperfolio kaj aŭskultis per ĝi la korojn. Kun surprizo li tre bone aŭdis korbatojn.

Tiam li eĉ ne pensis, ke li inventis unu el plej gravaj instrumentoj de la medicino – stetoskopon.

Elizabeta Rajtmár, Hungario.

RAKONTOJ PRI AFANTI - ĉinaj popolaj rakontoj

Mono kaj justeco

Foje la reĝo demandis al Afanti: „Afanti, se antaŭ vi estus mono kaj justeco, kiun el ili vi elektus?

„Mi elektus monon,“ respondis Afanti.

„Kiel, Afanti!“ miris la reĝo. „Se estus mi, mi certe volus justecon, absolute ne monon. La mono estas nenio valora, sed justeco estas malfacile trovebla.“

„Oni volas tion, kio al li mankas, via moŝto,“ klarigis Afanti.

Morti du tagojn pli frue ol vi

Pri Afanti oni diris, ke konas aŭguri. Iun tagon Afanti diris ŝerce al la ĉefministro, ke li mortos morgaŭ. La sekvan tagon la ĉefministro falis de sur ĉevalo kaj efektive mortis. Kiam la reĝo tion eksciis, li ekkoleris kaj tuj sendis soldatojn kapti Afantin.

Poste li kolere demandis: „Afanti, mia ĉefministro mortis pro via aŭguro, do, se vi ne antaŭdiros al mi, en kiu tago vi mem mortos, vi ricevos severan punon.“

„Mi bedaŭrinde ne scias tion precize,“ respondis Afanti. „Mi nur scias, ke mi mortos du tagojn pli frue ol vi.“

Aŭdinte tion, la reĝo pensis, ke plej sekure por li mem estus lasi Afantin vivi kiel eble plej longe. Tial li liberigis Afantin.

Turbano

Afanti promenis sur strato portante sur la kapo turbanon grandan kiel korbo. Lin renkontis iu, kiu petis: „Sinjoro instruito, bonvolu helpi al mi legi ĉi tiun leteron.“

Afanti repondis: „Mi ne konas eĉ unu literon kaj tial mi ne povas legi la leteron.“

La petinto ege miris kaj plu demandis: „Sed vi havas tiel grandan turbanon! Ĉu vi vere ne povas legi leteron?“

Afanti malvolvis la turbanon de sia kapo, volvis ĝin ĉirkaŭ la kapo de la homo kaj respondis: „Bone! Bone! Se vi kredas, ke sub granda turbano kuŝas ĉioscio, vi mem provu, ĉu vi nun povas legi leteron.“

Ĉina Esperanto-eldonejo, Pekino 1982.

Tri rakontoj el la libreto : LA MONDO RAKONTAS,

kompilis Theodor Kilian

(Osvětový dům v Třebíči el jaro 1970)

Bona solvo

Ŝahpur Sosani estis reĝo de Persio kaj vivis en la 4-a jarcento. Kiam li estis ankoraŭ knabo, li aŭdis tage bruon ekster la kortego. Li demandis siajn korteganojn, kio okazas. Ili respondis: „Urbanoj pasas la ponton, kiu estas apud kortego. Ĉar la ponto estas tro mallarĝa, pasantoj inter si insultas, disputas kaj krias.“

La juna reĝo tion pripensis kaj diris: „Kian konsilon vi povas doni al mi por forigi la malhelpon?“

Unu el la korteganoj respondis: „Starigu ĉe la ponto soldatojn kaj ili reguligu la transiradon.“

La konsilo ne plaĉis al la juna reĝo: „Iu el la pasantoj povus havi urĝan aferon kaj la deĵoranta soldato povus malhelpi lin, ke li ne atingus sian celon.“

„Do, kio estas farota laŭ la opinio de Via Reĝa Moŝto?“ demandis altranguloj kun respekta voĉo.

„Oni tuj ekkonstruu duan ponton: unu ponto servos al la pasantoj irantaj tien, la alia ponto por irantoj reen.“

Tiel ordonis reĝo Ŝahpur Sosani kaj la kontenta urbanaro laŭdis lian saĝon.

El persa lingvo Bahman Ŝidani, Teheran, Irano..

Trezoro

Haĝi Mehmet estis tre riĉa viro. Antaŭ sia morto li venigis al sia lito siajn tri filojn. Ili estis junaj kaj fortaj. La maljuna patro diris: „En nia ĝardeno estas granda trezoro, iru kaj serĉu ĝin!“

„Sed la ĝardeno estas granda, en kiu loko la trezoro troviĝas?“ demandis la filoj.

La patro respondis: „Ne, tion mi ne diros al vi. Trafosu la tutan ĝardenon kaj vi certe la trezoron trovos.“

La patro mortis. Post lia enterigo la filoj ekfosis. La tutan ĝardenon jam trafosis, sed la serĉatan trezoron ili ne trovis. Por ke ilia laboro ne estu tute vana, ili semis grenon en tiu bone preparitan grundon. Post kelkaj

monatoj riĉa rikolto rekompencis ilian laboron. Tio ripetiĝis multajn jarojn, ĝis ili fariĝis riĉuloj. Nur nun ili ekkomprenis, ke la trezoro, pri kiu parolis la mortanta patro, ne estas oro, sed laboro.

El la turka lingvo Mehmet Hulusi Haĝi Mustafa Aidin, Turkio.

Juĝisto kaj ostro

Promenante laŭlonge de la marbordo, du viroj trovis ostron kaj komencis disputi pri ĝi.

„Mi ĝin vidis unua, do, ĝi apartenas al mi!“ diris unu el viroj.

„Mi levis ĝin kaj tiel ĝi apartenas al mi!“ diris la dua.

Dum ili kverelis, preterpasis juĝisto kaj ili petis lin, ke li juĝu la aferon. La juĝisto konsentis. Sed antaŭ ol doni sian decidon, li diris: „Promesu, ke vi estos kontentaj, kiel ajn mi decidus.“

La viroj promesis. Tiam diris la juĝisto: „Ŝajnas al mi, ke vi ambaŭ povas pretendi la ostron; do, mi egale dividus ĝin inter vi.“

Malferminte la ostron, la juĝisto rapide englutis ĝin kaj poste li tre solene donis al ĉiu viro unu el malplenaj konkoj.

„Sed vi manĝis mem la ostron,“ ekkriis viroj.

„Ho, tio estas mia honorario je mia juĝo en proceso,“ diris la juĝisto, „sed mi dividis tute juste inter vi ĉion, kio restis.“

El la angla Wimfred E. Carter Bradford, Yorks, Britio.

Humuraĵoj kaj proverboj el „Litova Stelo“ 2001 - 2002

Atendejo

Virino aĉetis novan ŝrankon. Baldaŭ ŝi telefonis al firmao, kiu konstruis ĝin, ke ŝranko ne estas en ordo. Venis muntisto kaj virino eksplikas al li: „Apud domo estas fervoja linio kaj ĉiufoje, kiam preterpasas trajno, unu el ŝrankpordoj malfermiĝas.“

Ĝus venas denove trajno kaj la muntisto mem vidas: unu pordo mem malfermiĝas. Li esploras seruron, sed ne trovas difekton. Li pripensas kaj diras: „Bone, mi eksidos en la ŝrankon, vi fermu la pordon kaj kiam venos sekva trajno, mi rigardos interne, kio okazas.“

Dirite, farite. La virino apenaŭ fermis la ŝrankon, kiam eksonas ŝlosilo en loĝeja pordo. Neatendite frue revenas de oficvojaĝo ŝia edzo. Li salutas mirigitan edzinon, ekvidas novan ŝrankon, alpaŝas por pli bone rigardi ĝin... malfermas la pordon kaj tie sidas nia muntisto. Edzo konsternite demandas: „Kion vi faras ĉi tie?“

„Mi atendas la trajnon,“ diris la muntisto.

Sen interpretisto

En prero renkontis surĉevale indiano kaj vakero. Inter ili okazis jena „konversacio“: La indiano montras per unu fingro al la vakero. Tiu levas du fingrojn de dekstra mano alten. Poste la indiano kunmetas ambaŭ manojn, kvazaŭ ili simbolus pinton, kiu direktas ĉielen. Fine la vakero faras per unu mano serpentuman movon. Post tio ili disrajdas.

Vespere vakero rakontas al sia edzino: „Hodiaŭ en prero mi renkontis indianon, kiu diris al mi: *Mi mortpafos vin!* Sed mi respondis: *Antaŭe mi forpafos vin dufoje!* Post tio la indiano diris: *Mi petas pardonon!* Kaj mi respondis: *Prefere serĉu vojon por eskapi de mi!*“

Preskaŭ samtempe indiano rakontas al sia edzino: „Hodiaŭ en prero mi renkontis vakeron kaj mi demandis lin: *Kiel vi nomiĝas?* Li respondis: *Kapro*. Do, mi demandis: *Ĉu Montara Kapro?* Sed li diris: *Ne, Akva Kapro.*“

Trezoro de arabaj kaj islamaj proverboj

Beduinaj spertoj:

Ne malplenigu vian akvosakon je ekvido de miraĝo.

Lasu flanken kion vi aŭdas, ne kredu ĉion kion vi vidas.

Se vi loĝas en urbo, neforgesu jenajn konsilojn:

Kontraŭ al ministro, sed neniam al lia pordisto.

Se reganto estas tirano, la juĝisto servas kiel pendumisto.

Kaj tio eble estas tiel ke:

Se hazarde vi trovas unu juĝiston en paradizo, vi trovos du en infero.

Nun kosideru:

Malriĉo estas robo el fajro.

Malriĉulo kuranta en la strato, devus esti sur vojo en servo al riĉulo.

Kaj pri la amo?

Virinoj povas kaŝi sian amon kvardek jarojn, tamen sian malamon ne pli ol unu horo.

La diablo ne tute konsentis pri tio, kiam li deklaris:

Mi estas instruisto de viroj kaj lernanto de virinoj.

Eble oni ŝatus ekscii, ke:

Toleremo estas ankaŭ malavaro.

Gajeco estas ora manpremo.

Se vi ne povas esti stelo sur ĉielo, estu kandelo sur la tero.

Ne ĵetu sagojn de malbeno al via malamiko, ĉar eble vi trafos vian amikon.

Kiso sen amo bruligas lipharojn.

Unu libera homo povas liberigi tutan urbon.

Hussain Al-Amily, Britio.

Tri artikoloj el LITERATURA FOLIO *Vespero*

de Apáti Kovács Béla,
Hungario.

Promeno en la zooĝardeno

Malgranda Manjo iris al zooĝardeno kun sia avo.

Divenu, kiujn bestojn ili vidis.

Apud la pordego estis tre interesa besto. Ĝi estis alta kun longa kolo.
Tiu besto estis _____.

Manĝo kaj ŝia avo iris plu kaj ili alvenis kaĝon, kie estis gajaj bestetoj. Ili saltadis de branĉo al branĉo, ludis moke, aŭ kombis la hararojn unu al la alia. Oni diras, ke tiuj bestoj similas al la homo, ĉar ili estas _____.

Manĝo ekvidis gigantan, grizan beston kun longa nazego kaj kriis: „Rigardu avĉjo, tio estas _____.“

Apud la lageto kun varmeta akvo sunumis timiga kaj danĝera besto. Tio estis _____.

Kompreneble ili ankoraŭ vidis plimulte da bestoj. Ĉu vi konas ilin?

Almozpetanto

Irante sur strato mi renkontis almozpetanton. Li aspektis kompatinde. Liaj vangoj estis malgrasaj, nur liaj grandaj, nigraj okuloj brilis, petante de mi iom da forintoj. Mi jam delonge ne manĝis – li diris – unu peceto da pano plezurigus min.

Mi demandis: „Kial vi almozpetas?“

Li alrigardis min kaj malgaje diris: „Ĉar mi estas malriĉulo.“

„Se vi laborus, vi povus perlabori. Se vi havus monon, vi ne devus almozpeti.“

Li cinike ĵetis siajn okulojn al mi. „Kie mi trovas laboron?“

„Certe iu labordonanto volonte dungus vin. Kiu volas, tiu trovas laboron.“

Li ekridis. „Rigardu min! Ĉu mi estas tiu viro, kiun serĉas labordonantoj? Ne ridigu min!“

Eble li pravis - mi pensis – kaj mi provis konvinki lin: „Se vi lavus kaj razus, entute vi ŝanĝigus...”

Li abrupte interrompis mian predikon: „Homo, kie vi vivas?”

Efektive, kie mi vivas? Mi komencis mediti. Tiu ĉi viro estas malesperiĝinta. Mi volas konvinki lin, kion mi ankaŭ ne kredas. Miloj kaj dek miloj da laboristoj estas maldungitaj kaj familiojn minacas tragedio, tamen mi volas konvinki almozpetanton, ke li serĉu laboron.

Ja, se mi atenteme rigardus lin, mi devus vidi, ke mia babilanto havas laboron. Li estas almozpetisto. Li mem entreprenas kaj kuraĝe staras ĉe la stratangulo kaj almozpetas. Mi komencis kalkuli kiom da forintoj li povas perlabori ĉiutage?

Se ĉiu preteriranto donas al li nur unu forinton, tiam dum ok horoj preteriras almenaŭ tri mil homoj. Ni ne forgesu, nia almozpetanto „deĵoras“ en la centro de la urbo apud granda magazeno. Mi mem vidis per miaj propraj okuloj, foj-foje oni ĵetis cent aŭ ducent forintojn en ĉapelon. Se li estas sufiĉe lerta, tiam ĝis vespero en la ĉapelon li kolektos almenaŭ tri mil forintojn. Obligante ĝin per tridek, ĉar li staras tie ankaŭ sabate kaj dimanĉe, tiam fine la sumo superas naŭdek mil forintojn. (Mi devas rimarki, en Hungario simpla laboristo perlaboras malpli ol kvindek mil forintoj.) Nia almozpetanto ne pagas impostojn, eĉ de tempo al tempo li ricevas tagmanĝon kaj alian socialan helpon de la urbo.

Estas logike, kial elektas senhonte multaj homoj la almozpetadon.

Kompreneble tiu ĉi fenomeno ne estas ĝenerala, ĉar multaj almozptantoj apenaŭ ricevas iom da mono kaj krom tio diversaj bandoj, kiuj vivas el la almozpetantoj, prirabas ilin.

Tamen estas pripensinde, ĉu nur la unusola ebleco estas la almozpetado, aŭ ekzistas ankaŭ alia solvo?

Vojo al Eŭropo

Ĉu Esperanto prosperos en nova Eŭropo aŭ ĝi formortos kaj ĝi estos forgesita, kiel multaj lingvoj?

Estus bone kredi, ke Zamenhofs lingvo transvivos ĉiujn malfacilaĵojn kaj alvenos tempo, kiam ĝi iĝos la dua gepatra lingvo de la homaro.

Ĉu la homaro estas maturiĝanta por akcepti ĝin aŭ stulte batalos kontraŭ ĝi?

Eble Esperanto estis eltrovita tro frue. Ankoraŭ sur la terglobo ne solviĝis multaj problemoj. Ekzemple ni homoj ne povas liberiĝi de la militoj. Ni kredas – la problemoj plej ofte estas solveblaj nur per armiloj. Ankoraŭ milionoj da homoj malsatmortas, kvankam Tero povus nutri la tutan loĝantaron, se la produktaĵoj kaj aliaj estus dividitaj juste.

Ni esperantistoj ofte estas akuzitaj, ke ni troigas lingvan problemon. Ja, la angla lingvo sukcese plenigas la rolon de monda lingvo. Ankaŭ en nova Eŭropo ĝi iĝos la helplingvo per kiu diverslingvaj homoj komunikos...

Sed ni ankoraŭ ne scias respondon. Fakte ni ekpaŝis la vojon al Eŭropo kaj iutage ni alvenos, sed neniuj scias, kiel ni komprenos unu la alian.

Sed antaŭ ni, geesperantistoj, la pordo jam estas malfermita.

Tri artikoloj el „LAŬTE!“ – dumonata liberesprimilo por progresemluloj,

Fabelo pri la racio -

de Erich Kästner* numero 162 novembro 2002

Iam estis simpatia maljuna sinjoro, kiu havis la malbonan kutimon, ke de tempo al tempo li inventis raciajn aferojn. Nome: malbona kutimo tio iĝis nur tial, ke tion elpensitan li ne retenis por si mem, sed li kutimis tion prezenti al fakuloj. Ĉar li estis riĉa kaj malgraŭ siaj raciaj ideoj li estis ankaŭ respektata, fakuloj devis aŭskulti lin tre pacience, spite al siaj grincantaj dentoj. Kaj certe por fakuloj ne ekzistas pli terura turmento ol ridetante aŭskulti iun saĝan proponon. Ĉar la racio, tion ja ĉiu scias, simpligas malfacilajn problemojn tiamaniere, ke al tiuj fakuloj ili aspektas suspektindaj kaj tiel nekredeblaj. Kion do, tiel oni demandas sin kune kun ili, tiuj kompatinduloj povus fari, se regus ne ili, sed anstataŭe la racio! Do, jen.

Iutage la simpatia maljuna sinjoro estis avizita dum iu kunsido, en kiu partopenis la plej gravaj ŝtatestroj de la mondo por, tiel oni eksciis, forigi la surterajn disputojn kaj malfacilaĵojn. Granda Dio! ili pensis., kiu povas antaŭvidi, kion hodiaŭ denove li planas por ni kaj per sia stulta racio! Kaj ili petis lin eniri. Li venis, riverencis iomete eksmode kaj eksidis. Li ridetis, ili ridetis. Fine li ekparolis.

„Karaj sinjoroj kaj ĉefŝtatestroj,“ li diris, „mi havis, tiel mi kredas, utiligeblan ideon: Oni kontrolis ĝin laŭ ĝia praktika uzebleco; mi deziras prezenti ĝin al via rondo. Bonvolu aŭskulti min. Vi ne ŝuldas tion al mi, sed al la racio.“ Ili kapjesis, kontraŭvole ridetante, per siaj ŝtatestraj kapoj, kaj li daŭrigis: „Vi intencas certigi al viaj popoloj trankvilon kaj pacon. Tio unuavide kaj laŭ raciaj konkludoj povas signifi, kion ajn malsamaj povus esti viaj ekonomiaj opinioj, ke vi celas la kontenton de ĉiuj homoj sur la tero. aŭ ĉu mi eraras tiurilate?“

„Tute ne!“ ili reagis. „Absolute ne! Kion vi pensas pri ni, simpatia maljuna sinjoro!“ - „Kiel bele!“ li respondis. „Tiuokaze via problemo estas solvita. Mi gratulas al vi kaj al viaj popoloj. Veturu hejmen kaj komune asignu el la financoj de viaj ŝtatoj, en kadro de la koncerna konstitucio kaj

dividita laŭ bonhavo, iun sumon. Tiun sumon mi jam petis kalkuli plej precize, kaj je la fino mi diros ĝin al vi! Per tiu sumo okazos jeno: Ĉiu familio en ĉiu el viaj landoj ricevos donace malgrandan belan vilaon kun ses ĉambroj, ĝardeno kaj garaĝo, ankaŭ aŭtomobilon. Ĉar post tio la imagita sumo ankoraŭ ne estos elspenzita, vi povas – ankaŭ tio estas kalkulita – en ĉiu loko de la mondo kun pli ol 5000 loĝantoj, konstruigi novan lernejon kaj modernan malsanulejon. Mi envias vin. Mi ja ne kredas, ke materiaj aferoj reprezentas la plej valorajn surterajn havaĵojn. Tamen mi estas sufiĉe racia por kompreni, ke la paco inter la popoloj unuavice dependas de la materia kontenteco de la homoj. Dirinte, ke mi envias vin, mi mensogis. Mi estas feliĉa.“

La simpatia maljuna sinjoro prenis el sia poŝeto etan cigaron kaj ekbruligis ĝin.

La ceteraj ĉeestantoj pene ridetis. Finfine la plej supera el la ŝtatestroj ekkuraĝis paroli demandante per raŭka voĉo: „Kiom alta estas la sumo antaŭvidita por viaj celoj?“ – „Ĉu por *miaj* celoj?“ la simpatia maljuna sinjoro demandis, kaj oni konstatis el lia voĉo ioman miron. „Do, vi parolu nun!“ aldonis indigne la dua plej supera ŝtatestro. „Kiom da mono estus necesa por tiu eta ŝerco?“

„Unu biliono da dolaroj“, la simpatia maljuna sinjoro respondis trankvile. „Unu miliardo havas mil milionojn, kaj unu biliono havas mil miliardojn. Temas pri la cifero unu kun dek du nuloj“, kaj li daŭrigis fumi sian etan cigaron.

„Vi estas absolute idiota!“ iu kriis. Estis ankaŭ unu el ŝtatestroj.

La simpatia maljuna sinjoro eksidis rekte kaj rigardis mirigite al la kriinto. „Kiel vi venas al tiu ideo?“ li demandis. „Kompreneble temas pri multe da mono. Sed la lasta milito kostis la tute saman, kiel diras la statistiko.“

Aŭdinte tion, la ŝtatestroj kaj ĉefŝtatestroj okazigis tondran ridegon. Estis vera kriegado. Ili frapis la proprajn kaj najbarajn femurojn, ili kriaĉis kaj forviŝis siajn larmojn de ridado.

La simpatia maljuna sinjoro perplekse rigardis de unu al alia. „Mi ne komprenas vian gajecon. Ĉu vi bonvolas klarigi al mi, pri kio vi tiom amuziĝas? Se longa milito kostis unu bilionon da dolaroj, kial do longa paco ne povas esti samvalora? Kio do, bonvolu diri al mi, estas tiom ridiga?“

Nun ili ridadis ankoraŭ pli laŭte. Estas vere infera ridado. Unu el ili ne povis resti sidanta. Li eksaltis, firme tenis siajn dolorajn flankojn kaj kriis per siaj lastaj fortoj: „Vi estas vera stultulego. Milito – milito estas ja io tute alia!“

La ŝtatestroj, la simpatia maljuna sinjoro kaj ilia gaja konversacio estas plene inventitaj. Ke la milito kostis unu bilionon da dolaraj kaj kiom aliflanke oni povus fari per unu biliono, oni povas trovi en usona statistiko.

*Erich Kästner naskiĝis en 1899 kaj mortis en 1974. Li verkis multajn poemojn, librojn, precipe tre famiĝintaj infanlibrojn, ekzemple *Emil kaj la detektivoj*. Pro lia politika opinio liaj libroj estis forbruligitaj en 1933, ĉar la nazioj opiniis ilin „demoraligaj“. Li estas aŭtoro de tre multaj tekstoj kontraŭ milito.

Laŭ mia opinio tiu teksto, verkita antaŭ pli ol 60 jaroj! (marto 1948) estas kaj restas aktuala ĝis hodiaŭ – bedaŭrinde!

(Noto de la tradukintino: Nora Caragea, DE)

La manoj

Gbeglo Koffi

Mi ofte manĝas kun mia filino Aminda. Iam, dum la maĝado, ŝi rigardis min kaj diris: „Fi, Koffi, vi manĝas per la maldekstra mano. Ankaŭ mi tiel faru.“ Mi respondis: „Ne faru tiel, ĉar mi manĝas kiel vi, ne per la maldekstra mano, sed per la dekstra.“ Ŝi tute tion ne kredis. Poste ŝi sidiĝis antaŭ mi kaj ni manĝis el la sama telero. Kiam du homoj sidas vizaĝ-al-vizaĝe, la dekstra mano de unu kaj la maldekstra de alia troviĝas ĉe la sama flanko. Tiel Aminda kredis, ke mi manĝas per la maldekstra mano.

Nun la probemo estas:

„Ĉu oni ne manĝu per la maldekstra mano?“

En nia medio la maldekstra mano estas ege malŝatata. Ĝi faras malbelajn agojn: viŝado de la anuso post fekado, portado de fekaĵoj, tenado de nemanĝindaĵojn ktp. Tial oni manĝu ne per ĝi, sed per la dekstra. Tiu ĉi faras ĉiujn aliajn taskojn: manĝi, skribi, doni ion al iu, frapi, saluti, trinki, labori ktp. La maldekstra povas tamen helpi al la dekstra, kiam tiu ĉi sola ne povas fari taskojn. Se iu estas frapita per la maldekstra mano, tiun oni konsideras malpurigita, kaj tiel necesas repurigi lin. Same oni ne tuŝu iun per maldekstra piedo. Antaŭe kaj nun en multaj vilaĝoj, en lernejoj, oni neniam permesas, ke lernantoj skribu per la maldekstra mano. Neniam per la maldekstra mano oni ricevu ion de iu, aŭ donu io al iu.

Aminda vivas en medio, kie la maldekstraj piedo kaj mano estas konsiderataj kiel malŝataĵoj, malpurigaĵoj. Tial, kiam ŝi kredis, ke mi manĝas per la maldekstra mano, ŝi ne estis tute kontenta.

LAŬTE!, numero 150, novembro 2000.

Versoj nostalgiaj

Dominique Sébillotte (1.12.1997)

Ankoraŭ juna hieraŭ estis mi kaj am' en kor' mia kantis,
Same kiel belan vinberaron bluan vivon mi mordegis
Kaj vinon novan de sun' somera brunruĝigitan ŝatrinkis,
Temp' maliceta sed esperojn frenezajn miajn forportis
Kaj al mort' antaŭen jam paŝegas mi,
Lasante laboron de destin' mia nefinitan malantaŭ mi.

(27.8.1997)

LAŬTE! numero 134, marto 1998.

Du ciganaj fabeloj el la libro „Faktoj kaj fantazioj“ de Marjorie Boulton

La mistera amanto

Bela junulino havis nek edzon, nek patron, nek patrinon, nek fratojn, nek fratinojn, nek iu ajn parencojn. Ĉiuj jam mortis. Do, ŝi loĝis en kabano, ekster vilaĝo, proksime de arbaro kaj neniu vizitadis ŝin.

Unu vesperon, bel-aspekta vaganto frapis sur ŝian pordon: „Mi estas vaganto. Mi vojaĝis longtempe en multaj landoj. Lasu min ripozi ĉi tie. Mi vere ne povas piediri plu.“

La junulino diris: „Nu, ripozu. Mi povas disponigi al vi matracon. Kaj ĉu vi deziras manĝi aŭ trinki ion?“

Li manĝis kaj trinkis kaj baldaŭ li kuŝiĝis sur la matracon, dirante: „Nun vere mi dormos denove, mi ne dormis dum longa tempo.“

„Kiom longe?“

„Ĉarmulino, mi dormas nur unu semajnon dum jarmilo.“

La junulino ridis. „Kia ŝerco! Vi vere estas amuza blagulo!.. He, li jam endomiĝis.“

Leviĝinte matene la vaganto diris: „Vi estas tre bela junulino. Se vi permesos, mi povos resti kun vi ĉi tie dum tuta semajno.“

Ŝi jam amis lin, tiel belaspektan kaj bonhumoran kaj volonte ŝi konsentis.

Pasis tago kaj nokto kaj tago.

Meze de la nokto la junulino vekiĝis kun krio kaj vekis karulon.

„Ho, mia kara! Mi havis tre malbonan sonĝon. Mi sonĝis, ke vi estas malvarma kaj blanka kaj ni veturas kune en belega kaleŝo. Sed trenis ĝin ne ĉevaloj, sed ses blankaj birdoj. Vi prenis grandan kornon kaj ludis strangan melodion kaj alvenis grupo de mortintoj kaj ili akompanis nin. Vi estis ilia reĝo.“

Li diris nur: „Estis tre malbona sonĝo.“

Sed baldaŭ li leviĝis.

„Kara knabino, mi devas foriri. Dum longa tempo neniu mortis tra la tuta mondo. Adiaŭu min.“

La junulino ekploris: „Kial? Ne, kara, ne foriru. Restu kun mi!“

„Dio vin protektu! Mi nepre devas foriri.“

Li etendis sian manon por adiaŭi, sed ŝi kaptis ĝin, ploregante: „Kara, kara viro, kiu vi estas?“

„Tion scii, estas morti.“

„Diru al mi, kiu vi estas!“

„Vane vi demandas. Mi ne diros al vi, kiu mi estas.“

„Kara, mi estas preta suferi kun vi, sed nur diru al mi vian nomon.“

„Do, bone. Vi venos kun mi. Mi estas Morto.“

La junulino unufoje tremegis kaj mortis.

Preĝejo el fromaĝo

Antaŭ longa tempo la ciganoj havis propran preĝejon, belan, el griza ŝtono kaj la serboj havis preĝejon el fromaĝo.

Serbo vizitis ciganan ĉefon: „Kial ni ne interŝanĝu niajn preĝejojn?“

„Sed estus interŝanĝo malbona por ni ciganoj. Ni ne volas fordoni nian ŝtonan preĝejon por ricevi preĝejon nur el fromaĝo!“

„Sed ni povas doni monon, multan monon, kompense pro la malpli alta valoro de nia fromaĝa preĝejo.“

Aŭdinte la vorton *mono*, la cigano estis preta negoci. La serbo ion marĉandis, sed finfine ili interkonsentis pri la kompenso. La serbo kolektis multan monon, sed ankoraŭ mankis tridek dinaroj. Sed la cigana ĉefo konsentis, ke, ĉar ne estas granda sumo, la ciganoj povos iomete atendi ĝin.

Do, la serboj alproprigis al si la belan, ŝtonan preĝejon de la ciganoj kaj la ciganoj iris al fromaĝa preĝejo.

Kiam ciganoj staris tie kaj ĉirkaŭrigardis, unu malsata cigano derompis peceton da fromaĝo kaj komencis manĝi ĝin. La aliaj tre koleris kaj komencis tiri kaj bati lin.

„Ne... Ne... Fratoj! Kiel ataki min? Mi prenis nur peceton por gustumi!“ kaj li proponis pecetojn al aliaj.

Kiam la ciganoj gustumis la fromaĝon, ĝi gustis tiel bonege, ke ili ĉiuj rompis pecojn, rompadis... kaj post la tempo bezonata por kunfrapi la manojn – la preĝejo malestis!

Manĝinte sian preĝejon, la ciganoj ne sciis, kie preĝi. Ili iris al serboj: „Donu al ni la restantan monon.“ Sed la serboj ne havis ĝin.

Tial la serba ĉefo sugestis: „Ni interkonsentu: ni ne havas monon kaj vi ne havas preĝejon. Vi rajtas preĝi en nia preĝejo, ĝis ni pagos la lastajn dinarojn.“

Sed ankoraŭ nun la serboj neniam pagis sian ŝuldon. Tial la ciganoj ankoraŭ rajtas preĝi en serbaj preĝejoj... kaj la ciganinoj almozpeti de domo al domo!

El libro **Faktoj kaj fantazioj** de Marjorie Boulton,
komisiita de UEA por tiuj, kiuj apartenas al la kategorio *progresantoj*,
kvankam ne eblas difini tiun kategorion kun zoologia precizeco.

Noto

Ciganoj ne ŝatas la vorton „cigano“.

Laŭ NOVA PIV la vorto „romao“ estas konsilinda. Tamen ĉarma romaino ne sonas tiel bele kiel ĉarma ciganino precipe en kantoj.

Ciganoj certe mem solvos sian propran nomon en Esperanto kaj ni akceptos ĝin.

Tagoj kaj semajnoj

Ne ĉiuj konsideras la unuan tagon de la semajno lundo. Angloskala kulturo konsideras la unuan tagon de la semajno dimanĉo kaj muzulmanoj sabato.

Eĉ difini tion, kio estas tago, estas malfacile. Tago, kiel 24 horoj, estas difino moderna kaj multaj lingvoj, anstataŭ adopti tute novan vorton por priskibi tiun periodon, daŭre uzas la vorton tago. Por multaj la tago komencas, kiam suno aperas, do, daŭro de la tago varias dum tuta jaro.

La anglaj kaj germanaj nomoj por tagoj devenas el Skandinavio, kie estis origine uzita kvin-taga semajno. La skandinavoj fondis siajn nomojn sur greka kaj romiana mitologio: Woden kaj Merkuro (ambaŭ dioj de milito) kaj Friggs kaj Venuso (ambaŭ diinoj de amo). Sabato ankoraŭ hodiaŭ en Islando, Svedio kaj Danio estas konata kiel „bantago“ (Laugardagur, Loerdag), ĉar oni ne povis trovi teŭtonikan ekvivalenton por romia Saturno – dio de agrikulturo. La problemo estis solvita laŭ romianaj soldatoj, kiuj regule banis sin je tiu tago.

La sep-taga semajno devenis el okcidenta Azio kaj ĝi disvastiĝis al Eŭropo kaj poste al norda Afriko. En aliaj partoj de Afriko oni trovas tri, kvar, kvin, ses kaj ok-tagajn semajnojn. La nombro de la tagoj korespondas al nombro de merkatoj en diversaj areoj. Fakte vorto „semajno“ estas la sama kiel merkato.

Ne ĉiuj lingvoj havas specialajn nomojn por la tagoj de la semajno. En multaj afrikaj lingvoj, ekzemple svahila, oni simple diras: unua tago, dua tago... Tamen, ilia unua tago ne ĉiam korespondas al nia unua tago, ĉar ĝi ofte estas sabato. Plimulto da antikvaj civilizacioj – egipta, babilona, majaa, ĉina ktp. – ne havis koncepton de semajno. Kontraŭ ili havis ciklojn de tagoj – dudek tagoj por majaa kaj aztekaj, anstataŭ sep tagoj eŭropaj.

Laŭ Maria José Alvarez Faedo, Eventoj n-ro 229/2002.

Luna kaj suna kalendaroj

Dum ĝenerala kalendaro dependas de la Suno – jaro egalas tempon, kiun bezonas la Tero ĉirkaŭiri la Sunon (365,26 tagoj) – la hebrea kalendaro estas bazita je la Luno.

Ĉia ĉefa tempounuo estas luna monato, la periodo, dum kiu la Luno rondiras la Teron. Tio daŭras proksimume 29,5 tagojn. Tial la hebreaĵ monatoj havas alterne 29 kaj 30 tagojn kaj la tuta jaro 354 tagojn.

Kiun kalendaron oni uzas nuntempe en Israelo?

Ŝtato, komerco kaj ĉiutaga vivo kutime uzas la ĝeneralan sunkalendaron. Sed por judaj festoj, kiuj estas ŝtataj ripoztagoj kaj ankaŭ por fiksi lernojarojn kaj por festi la religiajn datrevenojn, oni uzas hebrean lunkalendaron.

Ĉar la luna jaro havas 11 tagojn malpli ol la suna, akumuliĝas malfruo. Por korekti la daton laŭ la jaraj sezonoj oni aldonas ĉiun trian jaron kroman monaton kaj tiam la jaro havas 13 monatojn. Tio estas iom simila al la aldno de unu tago al februaro ĉiun kvaran jaron. Pro tiu korektado la judaj festoj okazas ĉiam proksimume en la sama sezono, sed ne precize en la sama dato laŭ suna kalendaro. La diferenco inter du kalendaroj varias kun ciklo de 19 jaroj.

Laŭ hebreoj la tago komenciĝas, kiam sur ĉielo aperas tri unuaj steloj.

Amri Wandel, Israelo.

De dosiero mane skribita donace ricevita el Belujo, de amikino Francine

Mensoga lingvo

La lingvo estas instrumento per kiu oni false ludas sur ĉiuj kampoj de la homa vivo. Por kaŝi la krudan realon oni uzas plibeligajn vortojn, duonverojn kaj mensogojn. Ne ĉiam publiko komprenas la veran signifon de vorto aŭ frazo. Oni laŭdas informojn aŭ ĝojas pri novaĵoj kiuj, se diritaj per aliaj vortoj, estus plorigaj.

Tre misuzita estas la vorto „produkti“. Nuntempe oni produktas ĉion ajn. Ekzemple oleokompanio informas, ke ĝi en difinita periodo produktis milionojn da bareloj da nafto. Kvazaŭ la mondo pliriĉiĝus per tiu naftokvanto. La vero estas ja la malo! Esprimate per aliaj vortoj, la sama informo povus teksti jene: „El la banko de naturo, banko kies kapitalo estas limigita kaj kiu ne donas rentumon, ni forprenis milionojn da bareloj da nafto kaj tiamaniere malfaciligis la vivkondiĉojn por niaj infanoj kaj iliaj posteuloj.“

En alia speco de kruda misinformado oni uzas la vorton „senkosta“, „donaco“, „rabato“ kaj simile. Ekzemple: firmao ofertas en granda reklamkampanjo, ke ĉiu, kiu aĉetas televidaparaton, ricevas senkoste radioricevilon. La vero estas, ke la aĉetanto pagas ne nur la televidaparaton, sed ankaŭ la radioaparaton, kiun li eĉ ne deziras havi. Kaj krome la aĉetanto kontribuas al la pago de la reklamkostoj. Tia reklamo per rabatkuponoj, ekstraj premioj kaj donacoj, kiu konstante plenigas la leterkestojn kaj turmentas la detalkomercistojn, nur kostas monon, pliriĉiĝas la reklamentreprenojn kaj ŝtelas monon de la konsumantoj. Estas ja ili, kiuj fine devas pagi ĝin. Ke la plimulto komprenas la blufon en la reklamo montras la fakto, ke en Svedio nur 3 elcentoj de l’disdonitaj rabatkuponoj estas uzitaj. Ĉiam, kiam ni legas aŭ aŭdas informojn kaj novaĵojn, ni devus kritike ekzameni la veran sencon de ilia enhavo. Precipe, se la informo venas

„desupre“, aŭ „de eksperto“, ni atentu, ĉar ili havas apartan lerton pri la maniero kiel kaŝi la veron.

Defroniitaj

Butikisto en Novjorko koleris pro multaj butikaj ŝtelistoj. Ili kaŭzis al li gravajn perdojn. Li fiksis sur la muron grandan afiŝon, kiu anoncis:

BUTIKAJ ŜTELISTOJ ESTOS DEFROSNIITAJ !

Post kelkaj semajnoj iu demandis al butikisto: „Kio signifas tiu defrosniita?“

Li respondis: „Mi tute ne scias, sed ekde la ekmonro de tiu afiŝo, ŝtelado el mia butiko malpliigis sesdek-procente.“

La arto reklami

Du bakistoj havis butikojn en unu strato. Unu metis grandan afiŝon sur sian fenestron: **ni vendas la plej bonan panon en la mondo.**

Rivalo momente koleris, poste metis sur sian fenestron afiŝon malpli grandan, malpli laŭtkoloran: **ni vendas la plej bonan panon en ĉi tiu strato.**

Blanka aŭ rozkolora

Usonano volis vendi salmokarnon en skatoloj, sed temis pri specio de salmo, kies karno estas blanka. Homoj, kiuj atendis, ke salmokarno estu rozkolora, ne volis aĉeti. Ĉu kolorigi la karnon? Ĉu presigi sur la etikedon sciencajn klarigon? Ĉu bankroti?

La komersicto presigis sur etikedojn: „Aŭtentika blanka salmokarno. Ni garantias, ke ĝi ne ruĝiĝos en la skatolo.“

Ĉiuj miloj da skatoloj oni disvendiĝis.

Stranga testamento

Irlanda riĉulo mortis en la jaro 1769. Notario kunvokis la heredontojn. Li komencis laŭtlegi: „... al mia bofratino la kvar malnovajn ŝtrumpojn sub mia matraco dekstre, al mia nevo Miĥaelo du neparajn ŝtrumpetojn kaj verdan noktan ĉapon; al leŭtenanto Johano Ŝtono unu bluan ŝtrumpon kun mia ruĝa mantelo; al mia kuzino Barbara malnovan boton kaj poŝon el ruĝa flanelo, al Anna mia mastrumistino mian difektitan akvokruĉon...“

La diversaj personoj ekkoleris, ne nur por seniluziiĝoj post esperoj, sed pro superflujaj humiligoj...

... ĝis Anna indigne piedbatis tiun difektitan kruĉon kaj el ĝi ekfalas ormoneroj. Tiam ĉiuj esploris kaj trovis, ke la ŝajne ofendaj objektoj estas plenaj de mono.

Dua stranga testamento

Franca dukino, kiu mortis en la jaro 1776, preskribis detale sian multekostan enterigan ceremonion. Inter aliaj ekscesoĵ ŝi ordonis, ke oni portu ŝian kadavron per solena procesio kvarcent kilometrojn al la enteriga loko, kun ĉiutaga diservo ĉe survoja haltejo kaj ducent torĉportantoj oficantaj tra la tuta vojo.

La dukino tamen testamentis tre bonajn mondonacojn kaj pensiojn al siaj geservantoj – sed sub kondiĉo, ke ĉiu loĝu aparte de ĉiuj aliaj, kaj ŝi detale preskribis la loĝlokojn.

Kial? Ĉar ŝi deziris ke ili ne klaĉu kune pri ŝi post ŝia morto!

Tasko de Tamara Popova el la revuo „SENNACIULO“, junio 2001

Tasko: Kiom da tradukistoj kaj interpretistoj devas ĉeesti traktadon de 13 reprezentantoj el diversaj landoj, kiuj ne parolas esperante?


Kondiĉo: tradukistoj parolas la gepatran kaj unu fremdan lingvon.

Solvado:


1. Por komunikado necesas du homoj, ekzemple ruso + franco. Ruso ne parolas la francan, franco ne parolas la rusan. Kiom da tradukistoj ili bezonas?

Unu tradukiston scipovanta rusan kaj francan. (f) (r) ↔

2. Aperas ankoraŭ unu homo el Hispanio – do, tri homoj. Kiom da tradukistoj ili bezonas?



3. Se estas kvar homoj – oni bezonas 6 tradukistojn



4. Se estas kvin (5)– oni bezonas dek (10)
5. Se estas ses (6) – necesas havi dek kvin (15)
6. Se estas sep (7) – devas esti dudek unu (21)
7. Se kunvenas ok (8) – oni bezonas dudek ok (28)
8. Se venas naux (9) – oni bezonas tridek ses (36)
9. Se estas dek (10) – tradukistoj devas esti kvardek kvin (45)
10. Se estas dek unu (11) – oni bezonas kvindek kvin (55)
11. Se estas dek du (12) – oni bezonas sesdek ses (66)
12. Se estas dek tri (13) – oni bezonas sepdek ok (78)

Konkludo:

$$X = \binom{13}{2} * (13 - 1) = 78$$

Se estas 13 diplomatoj, ili bezonas 78 tradukistojn por demokrate trakti.

Noto: Se ili uzus Esperanton – ili bezonus nur 13 tradukistojn. Krome, Esperanto estas facile lernebla, do diplomatoj eĉ parte povus bone kompreni pri kio temas, ili povas havi sian tradukiston kontinue apud si.

Noto: Se alvenus pluraj nacioj, ĉu vi povas kalkuli? Ekzemple 25? (Tio okazos eble en la jaro 2004.)

Respondo: Jes. Oni bezonus 300 tradukistojn por unu komuna trakto.

Noteto: Se iu estas bonega fakulo, fakte ne povas samtempe esti bonega lingvisto, eĉ multlingvisto.

„La (sin)mortigo“ - rakonto de Colin Simmonds

el MEJ-Cirkulero 2/2001, Britio

„Do, gesinjoroj, bonvenon. Mi estas ĉefa medicina kontrol-esploristo de la urbo Trier. Mi estas ĉi tie por raporti pri miaj eltrovoj kaj konkludoj rilate al publika demando pri la morto de Sinjoro Haroldo Hazono.

Kiel vi scias, la 23-an de marto pasintjare mi ekzamenis la kadavron de S-ro Hazono kaj konkludis, ke li mortis pro kugletar-fusila vundo ĉe kapo. Tiu fakto estas nekontestebla. Mi havas ĉi tie kopion de la jura kaj nekropsia raportoj, kune kun la makabraj fotoj, se iu el vi deziras ekzameni ilin poste.

Tamen, la afero iom komplikiĝis pro la fakto, ke tuj antaŭ sia morto, S-ro Hazardo estis saltinta de supro de deketaĝa apartament-bloko kun celo al sinmortigo. Ankaŭ la kopio de la fina noto (kiu elokvene indikas lian senesperon) estas alkroĉita por via tralego.

Kiam li falis preter la naŭa etaĝo, lia vivo finiĝis per kugletar-fusila pafaro tra fenestro, kiu tuj mortigis lin. Nek la pafinto, nek la sinmortigonto konsciis, ke sekur-reto estis instalita ĉe la nivelo de la oka etaĝo por protekti kelkajn fenestro-purigistojn, kaj ke pro tio S-ro Hazardo ne estus povinta efektiviĝi sian sinmortigon.

La juro informas nin, ke persono, kiu mortas celante al sinmortigo, estas konsiderata sukcesinto, eĉ kvankam la rimedo de forpaso eble ne kongruas kun la unua intenco. Se S-ro Hazardo estis pafita survoje al la certa morto naŭ etaĝojn pli sube, tio probable ne estus ŝanĝanta la mord-modelon de sinmortigo al murdo. Sed la fakto, ke lia celo de sinmortigo ne estus sukcesa, pensigis min, ke prava verdikto tamen devas esti murdo.

La ĉambro de la naŭa etaĝo, el kiu venis la kugletar-fusila pafaro, estas loĝita de maljunaj geedzoj. Ili daŭre kvereladis, kaj li minacis ŝin per pafilo. Li estis tiom ekscitita, ke kiam li premis la ĉanon, li maltrafis sian edzinon kaj la kugletoj trairis la fenestron, frapante S-ron Hazardon.

Nu, kiam oni celas mortigi personon "A", sed celante al tio mortigas personon „B“, oni kulpas pri murdo de persono „B“. Konfrontite al tiu imputo, la maljunulo kaj lia edzino insistis, ke ili ne konstatis, ke la pafilo estis ŝargita.

La maljunulo diris, ke estis longdaŭra kutimo minaci la edzinon per neŝargita pafilo. Li fakte ne intencis murdi ŝin; tial la mortigo de S-ro Hazardo ŝajnus akcidento. Tio estas, ĉar la pafilo estis nur hazarde ŝargita.

La esploro poste malkovris atestiton, kiu vidis la filon de la maljuna paro ŝarĝantan la pafilon proksimume ses semajnojn antaŭ la morta incidento. Riveligis, ke la maljunulino ĉesigis la finanĉan subtenadon de sia

filo kaj ke li, dezirante venĝon, kaj sciante pri la inklino de sia patro uzi la pafilon minace, ŝargis la pafilon atendente, ke la patro mortpafos la patrinon.

La afero nun temas pri la murdo de S-ro Hazono fare de la filo. Estas fina elstara surprizo. Plua esplorado malkovris, ke la filo, kiu fakte estis Haraldo Hazono, pli kaj pli senesperigis pro la malsukceso de sia plano okazigi morton de la patrino. Tial, la 23-an de marto li saltis desur la deketaĝa konstruaĵo kaj tuj mortis pro kugletar-fusila pafaro tra la fenestro en la naŭa etaĝo.

Konsiderante, ke li mem ŝargis la pafilon, mia raporto montros la verdikton 'sinmortigo'.

Ĉu demandoj?

Do, dankon pro via atento.“

Letero metita en venton

Zdenek Myslivec, Ĉeĥio

la 26-an de julio 2001 skribite al ĉeĥa radio.

Estimataj!

Mi estas via longjara aŭskultanto, preskaŭ daŭre mi aŭskultas vian elsendon, precipe „Meteor“.

Antaŭ nelonga tempo vi dissendis interparolon kun iu elstara homo de Germanio. Mi devas konfesi, ke mi ne estis tre atentema kaj eble mi ne aŭdis ĉion de komenco, eble la elsendo nomiĝis „Host do domu – *Gasto en domon*“. Ĉe fino de elsendo la germano rakontis sian personan rememoraĝon. Li estis dum proksimiĝinta fino de la dua mondmilito germana soldato en norda parto de Bohemio en iu vilaĝo. Tie li ekkonis virinon, kiu lavis antaŭ domo tolaĵojn. Li petis ŝin pri helpo kaj ŝi helpis al li. Germano deklaris deziron serĉi la virinon kaj lokon, kie la evento okazis.

Mi ekmemoris, ke mia patrino kutime lavis tolaĵojn antaŭ domo, ĉar post la morto de mia patro ni loĝis ĉe geavoj en malgranda ĉambro, kie oni ne povis uzi ujojn por lavi. Tie kun mi kaj panjo loĝis ankoraŭ mia frato naŭ jarojn pli aĝa ol mi.

Dum mia vivo mi kelkfoje aŭdis noton pri germana knabo, kiu iam vizitis nian familion, sed nenion certan. Nur nun, kiam mi demandis mian fraton mi eksciis, ke al nia domo je la 17-an de marto 1945 alskiiis sur mizera neĝo germana soldato, ĝuste, kiam panjo lavis tolaĵojn antaŭ domo. Li petis civilan vestaĵon kaj mia panjo, vidante knabon samaĝan kiel mia frato, ne povis ne helpi. Ŝi vestigis lin en vestaĵon post mia morta paĉjo kaj eble donis al li ian legitimilon. La uniformon panjo kun frato detruis kaj butonojn ili enfosigis. Pafilon ŝi ne volis havi hejme, ĝin ŝi donis al fidinda najbaro, ĉar ŝi timis pri knabaj ludoj. Ĉe mia frato restis nur belaj skioj, nordaj HIKORY.

Kaj nun post 56 jaroj mi eksciis detale pri la evento en propra familio, ĉar dum tempo de la evento pro la helpo al dizertinto minacis ekzekuto. Mi estis dekunujara kaj oni diris al mi nenion. Jes, mi devas konfesi, mi povus kaŭzi minacon, ĉar mi povus pri tio rakonti al kamaradoj. Cetero tiu ĉi letero estas tia ekzemplo.

Dum alveno de juna germano mi estis en lernejo kaj la frato en laborejo. Malgraŭ proksima fino de la milito, neniu povis antaŭdiri, kiel kondutos homoj, kiuj ĝis nun fieris per iu germana praavino kaj aliĝis al germana nacieco. Tamen ĉio pasis bone. La milito finiĝis kaj la evento inter

aliaj multaj eventoj estis forgesita. Do, ne estis saĝe pri tio paroli inter niaj homoj, ĉar helpo al germano, eĉ li estis dizertinto, oni ne bone akceptadis, eble eĉ nuntempe. Mia panjo pri tio neniam parolis. Certe ŝi tion ne opiniis grava afero. Sed mi pensas, ke tia konduto ne estis vere ofta, la tempo estis tre komplika.

Somere 1944 mi kun kamaradoj trovis en arbaro kabanaĉon, kie vivis kvar rusaj soldatoj, kiuj eskapis el kaptejo kaj kiujn ni subtenis per manĝo kaj medikamentoj. Tia afero estis tre riska, ĉar en nia lernejo unu klason uzadis „Wermacht“ kaj germanaj soldatoj promenadis en la arbaro. Estas ironie, ke nun eĉ tiu ĉi nia agado – helpo al rusoj – ne povus ankaŭ esti favore akceptata.

Mi kaj ankaŭ mia frato ne sopiras esti publike konataj, sed mi opinias, se tiu eksa germana soldato deziras trovi lokon, kie oni helpis al li, do, ni ebligu tion al li. Mia panjo jam ne vivas dudek unu jarojn. Ŝi neniam rifuzis helpi kaj multaj homoj pri tio ŝate ŝin rememoras. Do, rememoru eĉ tiun eksan soldaton.

Mi petas, ĉu iu povas kontakti lin, ĉu eble iu de vi helpus... ?“

Mia unua laborokupo

Origina esperanta rakontado de amiko – SAT-ano kaj mondcivitano
Adolfo Veselý.

Kiam mi foriris el Emmaüs-centro, mi serĉis laboron.

Dum mia vagado sur la stratoj de Boulogne-Billancourt mi haltis ĉe tiu fabriko kaj eniris. Iu civilvestita viro rimarkis min kaj rigardis min ekde la piedoj ĝis la kapo kaj poste demandis: „Kion vi serĉas, sinjoro?“

Mi estis surprizita, ke iu, al mizeraspekta vagulo, kia mi tiam estis, diras al mi **sinjoro**. Mi turnis mian kapon malantaŭen, por scii, ĉu iu staras post mi. Vidante neniun, mi hezite respondis: „Mi serĉas laboron.“

Li invitis min en sian oficejon kaj trarigardis miajn paperaĉajn dokumentojn, demandante kie mi loĝas.

„En metroo-vagonaroj, sinjoro,“ mi diris embarasite. Li momente silentis kaj poste diris, ke mi rakontu pri ĉi tio. Do, mi al li esplikis, kial mi estas devigata vivi en tiuj subteraj vagonoj kaŭze de bruligitaj piedoj, kiuj ankoraŭ nun bezonas la varmon. Kaj ankaŭ mi tie akiras la monon. Sed ne per almozpetado.

„Ĉu vi povas al mi diri, kiel tio eblas?“ li diris mirigite.

Kaj sentante, ke li interesiĝas pri mia sorto, mi kontinuus pluparoli.

„Mi sidas sur benkoj de metroo-stacio apud distribuaj aŭtomatoj, en kiuj estas frandaĵoj. Iuj vojaĝantoj enmetas en ilin la monerojn. Se alveturas ilia trajno, certaj homoj – verŝajne ne parizanoj, ĉar nesciantaj ke baldaŭ alveturos alia – tro rapide tiras la aŭtomatan tirkeston kaj ĝi restas blokita. Ili

simple ensaltas vagonaron kaj mia mano prenas el aŭtomatflanka kanaleta forgesitan frankon. Vespere ĉe Savarmeo estas per 5 frankoj sufiĉe abunda manĝo kaj ankaŭ mi aĉetas vojaĝbileton por uzi pli poste la lastan vagonaron, kiu restas nokte en iu el stacioj kaj en kiu mi povas surplanke dormi ĝis mateno, post kiam ĉiuj personoj eliros kaj enirejoj estas fermitaj.“

Kiam mi finis mian rakontadon, mi konstatis, ke li estas direktoro kaj mi atendis lian reagon. Post la fortrinko de proponita kafo li diris: „Sinjoro Vesely, mi komprenas vian situacion kaj ekde nun sentu vin ĉe ni kiel hejme. Provizore vi povas tranoktadi en la vestejo, sed mi petas, ke vi atentu, se vi fumus ne kaŭzu incendion. Ni premis la manojn kaj la amika dungigo estis finita. Poste li prezentis min al laborkunularo kaj mi ĉiam post la fino de la labortago uzis la duŝon kaj en vestejo sur malplenaj sakoj, sur kiuj estis surskribo *Eburio*, mi kontente dormiĝis. Nian direktoron mi vidadis malofte. Kaj eĉ liajn bonintencajn proponojn mi ne ĉiam akceptis. Iam li venis kaj diris al mi: „Venu kun mi al kakao-muelilo, tie laboras unu alĝeriano kaj mi preferus, ke vi tie laboru per tiu maŝino, vi havos duoble plialtigitan salajron!“

Sed mi tuj rifuzis, dirante al li, ke tiu laboristo laboras diligente kaj zorgas pri siaj infanoj. Tial li bezonas gajni multe pli ol mi, fraŭlo.

En nia kantino estis viraĉo, kiu ĉiumatene preparadis por ni manĝon kaj kakaon, kiun ni ricevadis senpage. Foje okupante per ŝarĝado de kamiono, miaj kunuloj demandis min, ĉu iri matenmanĝi, aŭ prefere ŝarĝigi la varojn. Mi diris, ke ni unue finu la laboron kaj poste matenmanĝos. Sed tiu kantinisto ŝlosis la pordon kaj ne volis nin servi. Neniu el ni iris tion diri al nia direktoro. Mia sola protesto estis simpla: mi demetis mian laborveston kaj duŝis min kaj en pura vestaĵo trairis nian laborejon. Kiam vidis min miaj laborkunuloj, diris al nia grizhara bonkora ĉefo: „Vesely prave foriras kaj vi nenion diras?“

Kaj li respondis: „Kion mi diru al mondcivitano?“ (Ili ĉiuj konsideris min tiu.) Miaj paŝoj kondukis min en kafejon, kie mi ion manĝis kun la kafo kaj fumante unu aŭ du cigaredojn mi aŭskultis per muzik-aŭtomato la

rokenrolan, aŭ jazan muzikon. Kutime de Sidney Bechet aŭ de Louis Armstrong. Ĉefe al mi tre plaĉis aŭskulti la „Rock Around The Clock“ de Bill Haley. Post ĉi tiuj agrablaj ripozoj mi trankvile revenis en laborejon. Pro la stulteco de nia kantinisto nia direktoro iel eksciis pri ĉi tio, kaj faris en nia kantino kontrolon. Li trovis, ke tiu fiulo estas ŝtelisto de kuireja oleo kaj de aliaj varoj kaj maldungis lin.

Iun vesperon mi decidis veturi al Parizo por poste tie dormi en hotellito. Ĝojante mi vagadis en la stratoj kaj la vetero estis milda. Iom laciĝinta mi eksidis sur unu ŝtupon ĉe enirejo de metroo Châtelet. Kiam oni fermis ĝin, mi ne plu planis trovi ian hotelon kaj kuŝiĝis kiel antaŭ kelkaj monatoj sur ŝtuparon kaj pensante, ke tio ne gravas, almenaŭ mi ne elspezos la monon. Post ioma duondormo mi eksentis ke iu kuŝiĝas apud mi. Tial mi laŭ kloŝarda* kutimo turniĝis al tiu venulo mian dorson. (Ĉar ĉefe la dorson estas necese ŝirmi por ne malvarmumi). Iom post iom ĝi enmetis sian manon sub mian mantelon kaj tuŝis mian bruston kaj denove ion serĉis. Cetere tie mi monon ne havis kaj post mallonga momento sur mia vango mi sentis kison. Mi tuj pensis, ke tio estas ia ĉarma virino. Sed fingroj premis mian gorĝon, tamen mi ne lasos strangoli min, mi fulmrapide stariĝis kaj ekdiris: „Ho, kia diablo!“ Mi ne plu memoras, ĉu esperante, ĉu france, aŭ ĉeĥe.

Antaŭ mi staris malbelaĉa viro kun elrulitaj okuloj kaj malfermita buŝo kun fiaj dentoj. Mi tuj preskaŭ el ĉi tio vomigis. Kaj anstataŭ miaj planoj por dormi en ia hotellito, mi pro sentita naŭzo en mia stomako fordrinkis mian monon en dumnokte malfermitaj kafejoj. Mi pri tio rakontis al triopo el miaj laborkunuloj. Unu el ili pli poste vidante min preparigi al foriro urben, diris al aliaj: „Vidu, tiu Vesely preparis sin por iri rendevui kun la „Demoiselle du Châtelet“ (Fraŭlino Ŝatle). Tiam ni ĉiuj elkore ridis.

En nia plurnacia kolektivo laboris kvaropo da musulmanoj kaj dum ilia ramadano ili estis tre lacaj, ĉiu foje kiam mi povis, mi helpadis al ili dum laborego. Mi estis plene konvinkita, ke ĉiuj krom tiu ŝtelisto, konsideris min, kiel bonan amikon, eĉ la magazinestro diris, ke mi kondukas kiel Jesuo. Li ankoraŭ eble ne sciis, ke ekzistas iu, kiu nomiĝas H.A.Grouès (abato Pierre). Ĝuste ĉi tiu homo aparteas al tiuj, kiuj malfermis miajn okulojn.

Kiam ni fariĝis malkontentaj kaŭze de niaj salajroj, ni ekkomencis striki, eĉ se la duono el tuta kolektivo ne sekvis nin.

Mi enkuraĝigadis strikantojn dum la tuta semajno kaj post ĝi alvenis decido el nederlanda centro, ke niaj salajroj estos plialtigataj. Mi ne scias, kion pri mi pensis nia direktoro, vidante min inter strikantoj. Tamen li vidis pli ĝojplenan kaj pli laboreman kolektivon, ol tio estis antaŭe.

Iun tagon pensiuliĝis nia maljuna ĉefo. Anstataŭis lin pli juna, tute nekompetenta, tial mi forlasis ĉi tiun fabrikhejmon, en kiu mi pasis 11 monatojn.

*kloŝardo estas persono, kiu propravole forlasis normalan civilizon, vivas en metrooj kaj sub pontoj, celante absolutan liberecon, diference de vagabondoj kaj senhejmuloj, kiujn elpelis mizero.

„Homo kiel traflua varmigilo“

artikolo de Peter Becher

Dum jarcentoj estis lingvo en formo de libroj kaj gazetoj la plej grava komunikilo. Eltrovo de Johano Gutenberg en la 15-a jarcento farigis progresegon kompare al transkribo en monaĥejoj kaj kortumaj kontoroj. Tia facila depono de ideoj kaj ilia dissendo signifis ne nur plirapideco de komunikado, ĝis tiu tempo nekonata, sed ankaŭ nuligis privilegion de eklezio kaj nobelaro sur kampo de klereco. Sen presita lingvo ne ekzistus kulturo, kiu celas kleran, rajtmaturan homon. Libereco de presado estas unu

el la plej gravaj postuloj de civilizacia socio, kaj cenzuro estas unu el la plej efikaj rimedoj al teno de superrego. Tio funkciis ĝis 20-a jarcento, eble ĝis nun, eĉ la cenzuro iel prizorgas konstante pli malpli malmulte da politikajn opiniojn kaj konstante pli kaj pli trairas al etiko (prefere al perforto kaj pornografio).

Presitaj vortoj postulas ne nur kleran leganton, sed ankaŭ koncentrigon, abstraktan imagon kaj mediton. Ili ebligas ripetitan legadon, oni povas ilin forporti kaj poste citi. Presitaj vortoj estas baza ŝtono de civitana socio, estas kampo por informoj, opinioj kaj diskutoj. Ili plirapidigas disŝutadon de informoj, sed donas tempan pason kaj ebligas al leganto uzi tempon por reago. Vortojn oni devas prepari, presi kaj distribui. Presitaj vortoj raportas pri eventoj proksimaj eĉ malproksimaj, politikaj kaj socie gravaj, publikaj kaj privataj, informas kaj amuzas, tamen tenas limojn kaj supervidon.

La dudeka jarcento tiun ordon tute ŝanĝis. Dum unua duono de dudeka jarcento transprenis gravan rolon en komunikado radio kaj dum dua jarcento televido. Radio ne bezonas kleran aŭskultanton, kiu regas la skriban lingvon, sufiĉas kompreni gepatran lingvon. Radio uzas pli simplajn frazojn kaj ideoj estas malpli komplika. Aŭskultanto ne povas forporti la vortojn kaj aŭdi denove, li devas kompreni tuj. La tempa paso preskaŭ mankas. Tio, kion iu ie diras, oni povas samtempe aŭskulti malproksime eĉ milojn da kilometroj. Aŭskultanto frontas la vortojn. Informo ne enhavas abstraktajn signojn, vortoj povas soni terurige eĉ alloge. Sonojn oni povas konduki tiel vive, ke la aŭskultanto mem sentas ĝojon, malkontenton, timon. Limoj inter realo kaj fikcio oni povas facile trairi. Fama estas radia elsendo de „Milito de mondoj“, kiun verkis Orson Wells en la jaro 1938. Tiu elsendo kaŭzis ĉe multaj civitanoj de Usono panikon, ĉar ili kredis, ke dum momentoj okazos konkero de eksterteranoj. Pri tio skribis eĉ pragaj ĵurnaloj. Radio estis grava propagandilo de nazistoj. Tiel nomata „popola aŭskultilo“ (Volksempfänger), kiun posedis preskaŭ ĉiu familio, elsendis muzikon kaj amuzaĵojn el publikaj koncertaj salonoj kaj teatroj en privatecon de hejmoj. Tio estis revolucio. Certe multaj homoj ne perceptis, ke samtempe alvenas al homoj politika propagando. Temis pri tute nova formo de politika influo.

Nazistoj tre vigle reagis kontraŭ aŭskultado de „malamikaj elsendiloj“. Ili neglektis rajtmaturecon de civitano, sed preferis monopolon de manipulado.

Hodiaŭ ne povas radio kaŭzi inter homoj panikon komparite kun jaro 1938. Homoj kutimiĝis kaj la radio estis premita flanken per televido. Televido ne alportas abstraktajn vortojn kiel ĵurnaloj aŭ parolitajn vortojn kiel radio, sed moviĝantajn bildojn kaj vortojn kiel filmo. La vortoj estas emociitaj aŭ subdesegnitaj per sonoj kaj pro tio estas vortoj kiel portantoj de enhavo forŝovitaj al la dua, apuda loko, post la bildoj. La tempa paso kaj fizika foriro praktike mankas. Tio, kio okazis ĉe sojlo de nia hejmo oni en televidaj raportoj montras same, kiel tio, kio okazis en Afriko aŭ Aŭstralio. Televido alportas en hejmojn tutan mondon.

Ĉe komenco de televida epoko oni elsendis de malfrua posttagmezo ĝis vespero. La programon oni povis akcepti nur de unu ŝtata stacio. Vidantoj havis eblecon programeron elekti kaj anime digesti. Nun oni elsendas 24 horojn tage. Ŝtataj kaj privataj stacioj konkuras pri atento. Vidantoj povas elekti el 40-50 programeroj samtempe. Kiu posedas satelitan antenon povas akcepti programerojn de la tuta mondo. Mankas la tempo por reago al programero kaj pri supervido oni ne povas eĉ pripensi. Vidanto rigardas viglan fluon de bildojn, li ŝanĝas staciojn kaj programeroj kunfluas. Multaj homoj estas englutitaj en tiun buntan mondon kaj pasas tempon antaŭ ekrano dum matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo kaj poste dum vico da horoj vespere ĉiutage. Ofte homoj inter si ne parolas, sidas apud si kaj maĉas. Nur malalta elcento de televida programo enhavas raportojn aŭ edukemaĵojn, plimulte oni elsendas amuzaĵojn, reklamojn kaj muzikon, detektivaĵojn, filmojn, diskutejojn kaj serialojn. Superregas usonaj filmoj, almenaŭ en germana televido jes.

Fenomeno de televido totale ŝanĝis kaj englutis bazan aferon. Homoj ne devas batali por libereco de vorto, male ili estas superŝutitaj per supermulto de raportoj kaj elsendoj kaj tute ne kapablas forĵeti malutilaĵojn. Cenzuro hodiaŭ ne funkcias per malpermeso de raportoj, sed per troeco de raportoj. Nur distino de gravaĵo aŭ de malgravaĵo postulas tiom da tempo, ke vidanto ne povas tion fari. Dum iu meditas pri iu programero, se iu tion

hazarde faras, oni elsendas dekojn plurajn, kiujn neniu povas percepti. Iama rajtmatura civitano estiĝis traflua varmigilo, kiu devas la raportojn konstante malmemoradi, por ke li povu akceptadi novajn, kiujn tamen devas rapide malmemoradi, ĉar oni elsendas la plej novajn. Ununura raporto perdas valoron. Al ĝi mankas enhavo por memori, ĝi estiĝis nur brulaĵo, per kiu oni hejtas. Nur tiam, kiam iu temo pli longan tempon denove kaj denove ekscitas, iomete restos en memoro, sed nur por destina tempo.

Kiu kapablas nun diri sen meditado, kiaj temoj estis en pensoj de homoj antaŭ du, kvar, ok jaroj? Kion oni scios post kvin jaroj pri pasiaj debatoj kaj pri balotado antaŭ kelkaj monatoj? Laŭ ĉiuj antaŭvidoj – tute nenion.

Tia informiga mondo de samtempo influas homojn pli forte, ol ĉiam antaŭe. Senhalta elsendo per trompa maniero fuŝas malnovajn valoraĵojn, sed ne per malpermeso, ne terurego aŭ manko, sed per troeco, allogaĉo kaj trograseco. De homo oni ne postulas koncentrigon, pripensadon, sed kaŭzas nervozecon kaj surfacecon. Eĉ politikaj raportoj oni anoncas per amuza maniero, precipe ĉe komercaj stacioj. Valora hierarĥio de seriozaj informoj iom post iom malaperas. Raporto pri gajno en teniso aliras al unua loko, la parlamenta balotado pri programo de sociala helpo nur al la dua loko.

Inklino al banaligo kaj al infantileco rilatas al inklino de skandaligo. Raporteco jam aŭtomate ne celas mezuron de prestiĝo, sed per mezuro de okulfrapo kaj aparteco. Kunveno, kiu okazis antaŭ kelkaj monatoj en Berlino aperis en raportoj nur danke al tio, ke unu partoprenanto havis teruran imagon de „akso de malbono“, kiu direktas de Munkeno tra Vieno ĝis Budapesto. Ĉu iu nun memoras pri kiu oni traktis, aŭ fakte ne traktis? La skandalo estis senzacio, efektiva diskuto estis male seninteresa.

Samtempaj komunikiloj ne nur nekredeble subtenis kaj pliriĉiĝis, sed ankaŭ trosatigis kaj sufokigis. Tute preskaŭ en ĉiu familio estas televidilo, ofte en ĉiu ĉambro po unu. Mi eĉ vidis tiel ekipitan banejon. La influo estas tiel forta, ke neniuj politikistoj ignoras ĝin. Influo de politikistoj jam delonge ne kongruas kun lia politika arto, sed nur kun lia prezento en televido. Oni perceptas lin kiel filmstelon, artiston, aŭtomobilan konkuriston, amuziston... Dum diskutaj elsendoj ili sidas komune. Ĉio estas amuzo, ĉio estas politiko. Kien tio celas?

Aŭtoro estas direktoro de germana „Asocio de Adalberto Stifter“, prizorgata ĉefe kulturajn ĉefo-germanajn rilatojn. La prelego estis planita por kunveno en urbo Litoměřice kaj por revuo „Salon“. De germana al ĉeĥa tradukis Jana Zoubková, el ĉeĥa al Esperanto Jindřiška Drahotová.

Tri artikoloj el la plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto-movado
EVENTOJ pk. 87 Budapeŝto H-1675, Hungario redaktoro@eventoj.hu

Esperanta Enciklopedio

Por movado ĝenerale kaj por instruistoj speciale gravas la nove kreskanta reta enciklopedio **VIKIPEDIO** <http://eo.wikipedia.com>

Tien devus kontribui ĉefe instruistoj kaj utiligi ĝin ankaŭ por instruado kaj movigo de lernantoj. Posedi en la reto esperantlingvan informojn pri ĉiuj imageblaj temoj gravas por utiligo de la internacia lingvo, sekve ankaŭ kiel pruvo pri ĝia utileco. Ekde novembro 2002 aperis pli ol du mil artikoloj, kiujn oni eblas utiligi ankaŭ dum instruado.

En Vikipedion oni povas skribi ne nur pri ILEI kaj aliaj esperantaj organizoj kaj eminentuloj, sed ankaŭ pri ĉiuj landoj, iliaj urboj, historioj, vidindaĵoj, artistoj, sciencistoj, bestoj, plantoj, pri ĉio, pri kio kutime informas enciklopedioj.

Vikipedio jam ekzistas en 26 lingvoj, la plej riĉa estas la angla (pr. 30 mil artikoloj), sed la nia povas ĝin baldaŭ atingi.

ILEI devus speciale prilabori pedagogiajn temojn (mi kontribuis per artikolo pri Komenio), tiel finfine kolekti ankaŭ la pedagogian terminaron (kvankam el enciklopedia, ne terminara vidpunkto), kaj ankaŭ pri aliaj temoj (geografiaj, botanikaj, kulturaj k.s.) estus plej taŭgaj kontribuantoj la instruistoj.

En la hejmapaĝo vi trovos konsilojn „Kiel krei paĝon“ kaj „Kiel redakti paĝon“.

Miroslav Malovec

STARTO organo de ĈEA n-ro 238.

rete: malovec@volny.cz

Esperanto Noblat JR.

Iam en la okdekaj jaroj mi konis homon, kiu nomiĝis „Esperanto“ (antaŭnomo).

Mi estis parkumata mian aŭtomobilon kaj mi perceptis, ke iu taksio haltis proksime al mia veturilo. El ĝi eliris ŝoforo, kiu sin direktis al mi. Estis

vintre kaj la loko estis iom malluma. Mi timis, sed la homo tuj trankviligis min dirante, ke li ne volas rabi min. Kaj li tuj demaandis min: „Ĉu vi nomiĝas Esperanto?“ Kaj mi respondis: „Tute ne! Mi estas instruisto de Esperanto! Kial vi demandas tion de mi?“ Kaj li respondis: „Ĉar mi mem nomiĝas Esperanto Noblat Jr. , filo de de Esperanto Noblat.

Mi demandis: „Ĉu vi estas esperantisto?“ kaj la homo respondis: „Ne!“ (Fakte li estis simpla homo kaj tutcerte ne interesiĝis pri lernado de lingvoj.)

„Sed kial vi nomiĝas Esperanto?“

Kaj li aldonis: „Mia avo elektis tiun nomon por mia patro kaj li ŝatis ĝin kaj ankaŭ nomis min Esperanto. Mi decidis alproksimiĝi al vi, ĉar mi vidis sur malantaŭa glaco de via aŭtomobilo tiu gluafiŝon *ESPERANTO – lingvo internacia* kaj mi pensis, ke vi ankaŭ nomiĝas Esperanto.“

Tia estis tago, kiam mi ekkonis homon, kiu fakte nomiĝis Esperanto.

Aliosio Sarotrato

El Brazila Esperantisto decembro 2000

Eventoj n.ro 213

Lingvaj strangaĵoj en internacia medio, kiujn mi spertis inter samlingvanoj.

Pluvegis kaj estis malagrabra veteraĉo, pri kiu ni ĉeĥoj diras, ke falas unuradaj ĉaretoj. Sed franco, kiu staris kun mi sub arkado ne konis tion. Li diris, ke falas hundoj kaj katoj.

Ĉeĥoj diras, ke la potoj havas orelojn. Aliaj nacioj pri tio tre miris kaj ridis, kiam tion de mi aŭdis. Ili diris, ke potoj havas tenilojn.

En Pollando dum promeno mi diris: Jen, tilio! Nia nacia arbo, ĉeĥe „lípa“. Polo kun surprizo diris: -lipa- signifas ion tute senvalora en pola lingvo! Ni iris plu kaj ni vidis tabak-vendejeton kun surskriboj: PRASA, ZAPRASANY.

Sed mi ne diris, ke en ĉeĥa temas pri malpura porko. Poloj estas ĝentilaj kaj kisas al virinoj manon publike, io ĉe ni tute nekonata, neebla.

En Ruslando mi pensis, ke mi regas sufiĉe bone la rusan, ĉar mi lernis ĝin en lernejo pli ol sep jaroj. Tamen, de amikoj mi eksciis, ke ĉeĥoj ofte ŝanĝas la vortojn „skribi“ kaj „pisi“, uzante mise en rusa lingvo akcenton ĉe vorto „писать“.

Ĉeĥoj transpenis multajn vortojn de germana lingvo, precipe por esprimi sin sakre dum kolero: *Hergot!* (germane: Sinjoro dio!), *Krucifix!* (ger.: Kruco kun kruciumita Kristo!), *Sakra!* (ger.: Svatý!)... Ili nur malfacile trovus konvenan vorton el la ĉeĥa por sakri pli elegante.

J. Drahotová

Ĉapitro el la libro de Ivan Klíma: „Rondo de malamikoj kontraŭ ĉeĥa lingvo“

Yorkshira ministro – pri intelektuala diskuto

En la plej norda angulo de Danlando mi partoprenis interesan, kaj kiel ĉiuj partoprenantoj kredis, sugestan konferencon pri publika informado, pli precize oni povas diri – kontraŭ informado. Partoprenantoj alvenis preskaŭ de ĉiuj partoj de Eŭropo, tamen rilate al loko de traktado ili estis plej parte skandinavoj. Eble eĉ pro tio (skandinavoj danke al siaj sociale demokrataj registaroj estas al kutimiĝantaj havi „zorgeman“ ŝtaton) oni parolis plej parte pri maniero, kiel la ŝtato devas subteni arton. Ĝenerale ŝajnis regi opinio, ke la ŝtato tion faras malmulte. Dum debato ekprotestis iu liberala svedo. Li demandis, kial ŝtato el mono de impostpagantoj subtenu artistojn? Kial ekzemple yorkshira ministro pagus pro tio, ke ie en Londono malplikostus biletoj por baletaj aranĝoj?

Liaj vortoj ekvekis malemon. Tuj kelkaj partoprenantoj, inter ili iu brito, volis reagi. Unua oponentulo diris, ke ĉiuj konsideras evidenta, ke la ŝtato subtenas bazan inventadon, sed se temas pri arto, oni komencas paroli pri la mono de impostpagantoj.

La dua atentigis pri tio, ke ŝtato transprenas difinajn respondecojn. Ekzemple, ĉiuj eŭropaj ŝtatoj leĝigis devigan scion de ĉiu civitano legi kaj skribi. Plej parte bazaj lernejoj estas senpagaj, do pagita per mono de impostpagantoj. Eble, la yorkshira ministro havas kvin infanojn kaj ilian edukadon pagas eĉ geedzoj sen infanoj en Britio. Neniu dirus, ke ilia imposto estas maljusta.

Liberala svedo cedis, ke en kazo de edukado, li plene konsentas.

Kvin infanoj de yorkshira ministro plaĉis al kunvenantoj. Dum brito vane petis vorton, plua oratoro parolis pri ministra familio. Li supozis, ke eble nek ministro nek lia edzino vizitas baletajn ludojn, sed kio okazos, se unu el

filinoj volus fariĝi baletulino? Poste kompreneble ŝi partoprenos ĝuon, ke la baleto estas subtenata kaj ŝia patro partoprenas tiun subtenon. Sed se ŝi ne volus esti baletulino, povas ŝati baleton, aŭ alian arton, impresi ĝin kiel pliriĉiĝo de sia vivo. Kaj precipe tion oni ne devas subtaksi.

Ŝajnis, ke tiu konferenco neniam liberigos yorkshiran ministron pagi kotizon por arto.

Finfine ricevis vorton brita partoprenanto. „Mi volis atentigi,“ li diris, „ke en tuta Yorkshiro jam pli ol dek jaroj estas nenia ministro kaj minejo.“

Traduko: J.Drahotová.

El la libro „Poĉitaĉe a zdravi – Komputiloj kaj sano“

de MUDr. Karel Nešpor, CSs.

Ing. Datŝato: „Enkonduko de komputiloj kaŭzas pli altan produktivecon.“

Sinjorino Bakita: „Ĉe ni viroj ludas iajn ludojn, anstataŭ labori. Kaj poste la komputilo ne funkcias laŭ mia plaĉo. Precipe, se mi bezonas fari ion gravan.“

Aŭtoro: „Vi pravas iel ambaŭ. Pri la influo de komputado rakontas tiu ĉi artikolo.“

SHAKESPEARE (Ŝekspiro) KAJ KOMPUTILO

Shakespeare havis festotagon kaj iu el liaj admirantoj okaze tiu ĉi tago donacis al li komputilon. Donanto diris ion simila: „Majstro, se vi

skribas la teatraĵojn, prenu komputilon kun printilo, por ke vi estu pli rapida.“

Pri tio, kio okazis poste, ekzistas en fakaj grupoj de historiistoj diversaj opinioj. La plimulto de historiistoj konsentas, ke Shakespeare trairis per unua, kutima periodo, kiam li sentis sin „vizaĝe kontraŭ la vizaĝo“ kiel idioto. Helpis al li amikaj konatuloj, ia broŝuro kaj metodo: provo-eraro. Post iu tempo la majstro kapablis komenci per komputilo fari ion sencoplenan. En tiu punkto denove opinioj de fakuloj disiras. Por objektiveco mi konatigos vin kun ĉiuj versioj, sed mi devas konfesi, ke ne ĉiuj estas verŝajnaj.

1.versio: Shakespeare danke al donaco rapidigis labortempon, konklude ni nun havas tian grandegan nombron de liaj verkoj, sonetojn... ktp, kiujn li postlasis. Per ansera plumo li certe ne povis tiel multe verki.

2.versio: rapidigis tempon de laboro. Kiam li alportis al sia eldonisto disketon anstataŭ papera volvaĵo, ŝparis multon da tempo dum korektado. Aliflanke sed multe da tempo englutis komputoraj kursoj, depono de tekstaĵoj kaj relaboro de erare perditaj ĉapitroj, trajtoj de unu sistemo al alia, virusigo kaj forvirusigo de komputilo kaj pluaj agadoj por lia literatura verkado tute ne gravaj. Historiistoj, kiuj samopinias, asertas, ke per ansera plumo li verkus proksimume la saman nombron de verkoj kiel per komputilo. Nur ili ne estus skribitaj tiel bele.

3.versio: Shakespeare malmemoris teatraĵojn. Li okupiĝis per komputoraj ludoj, desegnis bildetojn kaj agis eĉ preskaŭ kiel infano. Kiam lin vizitis teatruroj, por ke li sendu al ili ian teatraĵon, li diris al servisto: „Johny, skribu al ili ion, por ke mi havu trankvilon.“ Servisto, do, prenis anseran plumon kaj sub nomo de sia sinjoro li verkis al teatra direktoro verkon „Hamlet“. El tiu teatraĵo oni povas klare senti kian malserenan, eĉ malĝojan humoron li havis.

Konklude: mi kuraĝas demandi al kara leganto nediskrete: Se vi estus Shakespeare, kiel finiĝus la afero?

SinJORino Bakita: „Sinjoro inĝeniero, ĉu vi opinias, ke iam komputoroj kapablos cerbumi aŭ eĉ senti?“

Ing. Datŝato: „Ho, iam! Jam nun tio estas realo! Kara sinJORino, aŭskultu ion pri mistera interna vivo de komputoroj ...“

Kelkaj anekdotoj

Programisto revenis hejmen kaj kato impetas al li, karesas per korpo liajn pantalonojn kaj lekas al li manon.

Edzino, vidante tion demandas: „Kio okazis al la kato? Kial ĝi lekas vian manon?“

„Stranga demando! Ja la mano havas odoron de muso.“

- o -

Katino vivanta en garbejo havis kvar katidojn. Tie trovis ilin hundo kaj pelis ĉiujn en angulon kaj bojis. Katino kuraĝe stariĝis kaj komencis ankaŭ boji kaj grumblegi al hundo. La hundo ĉesis boji kaj malrapide foriris.

Katino diris al katidoj: „Vidu, kiel utile estas lerni fremdajn lingvojn!“

- o -

En tiu sama vilaĝo vivis du blondulinoj, kiuj komune loĝis kaj mastrumis. Unu lavis sian hararon en banejo kaj vokis duan: „Kion mi faru! Restis al mi bolanta akvo.“

„Bolanta akvo estas iam bezonata. Deponu ĝin en fridujon!“

- o -

Blondulinoj promenis kune apud lago en kiu naĝis multaj fiŝoj. Unu demandis: „Ĉu vi kredas, ke fiŝoj povas paroli?“

La dua respondis: „Ne, ili ne povas paroli. Ili estas mutaj.“

„Kial do, kial ili estas mutaj?“

„Nu, ĉu eble vi povus paroli, se via kapo daŭre estus en la akvo?“

- o -

Ili venis urbon. Tie staris knabeto, kiu korŝire ploris. Blondulinoj haltiĝis kaj demandis lin: „Kial vi ploras, etulo? Ĉu io malbona okazis al vi?“

„Jes, mi perdis moneron,“ respondis knabeto.

„Kiom valoras la monero, kiun vi perdis?“

„Du centojn.“

„Ne ploru pro tio,“ konsolis ili lin, „jen, prenu tiun skatolon kun kelkaj restantaj alumetoj, por la kazo, ke vi ne retrovos vian moneron antaŭ nokto.“

- o -

Proksime de domo de blondulinoj loĝis du najbarinoj – patrinoj de trijaraj filetoj. Ili babilis ĉe barilo: „Vidu, via fileto jam legas ĵurnalon!“

„Ne, li ne legas. Li solvas krucenigmon! Ankaŭ nia hundo estas tre lerta kaj kapabla. Se ĝi iras hejmen, ĝi tuŝas sonorilon ĉe la pordo.“

„Nu, mia hundo uzas propran ŝlosilon.“

- o -

Post minuto revenis hejmen patro. Fileto kriis: „Paĉjo, paĉjo, ni estis en ZOOparko. Tie estis simio tiel granda, kiel vi!“

„Tio ne eblas,“ klarigas la patro, „tiel granda simio, kiel mi, ne ekzistas.“

- o -

Ĉiuj loĝantoj de vilaĝo, nu, preskaŭ ĉiuj, vizitis teatron. Aktoroj brile ludis ŝekspiran teatraĵon „Reĝo Rikardo la Tria“. En la tre streĉa momento la reĝo, kiun oni jam venkigis kaj kiu volas forkuri de la batalo, krias: „Ĉeval', ĉeval'! La regnon je ĉevalo!!“

Knabo laŭte krias el galerio: „Ĉu azeno sufiĉas?“

La granda aktoro, kies grandan scenon li detruis, kriis responde: „Jes, vi rajtas veni!“

- o -

Knaboj ricevis grandan hundon. Ĝi estis tre bela besto. Laŭ leĝoj la hundoj devas esti ekstere de domo buŝumitaj. Tial ili iris en specialan butikon por bestartikloj aĉeti buŝumon.

„Jen, sinjoretoj, vi povas elekti inter pluraj specoj de buŝumoj.“

„Ni prenos ĉi tiun,“ diris kanboj kaj tuj pagis.

„Ĉu mi sendu la buŝumon al via adreso,“ demandis gaja, juna vendistino, „aŭ ĉu vi preferas mem porti ĝin?“

- o -

Tiu ĉi vendistino vespere longe ŝminkis kaj vestis sin. Ŝia patrino demandis: „Kien vi volas iri?“

Knabino diris: „En kulturan domon. En najbara vilaĝo okazas „Gaja vespero“.

Patrino severe diris: „Je la deknua horo vi revenos, alie vi vidos!“

„Ni vidos,“ respondis filino.

Jam je la naŭa la filino revenis kaj silente eniris sian ĉambron. Patrino malfermis la pordon a kun demanda mieno ankaŭ silentis.

Post ne tro longa silento filino diris: „Mi mislegis. Ne estis gaja vespero, sed geja.“

- o -

Sekvan tagon vojaĝis patrino al apuda vilaĝo. Ŝi devis trapasi riveron sur boato. Ŝi estis ununura klientino de boatisto. Ekveturante la virino demandis: „Ĉu estos grandaj ondoj?“

„Mi nenion scias pri tioN,“ estis la respondo.

„Ĉu vi ne scipovas gramatikon?“ miris virino.

„Ne!“

„Do, vi perdas duonon de la vivo!“

Boatisto diris nenion. La rivero estis larĝa. Baldaŭ ekblovis vento kaj la boato estis akvoplena.

„Ĉu vi scipovas naĝi?“ demandis boatisto.

„Ne!“

„Do, vi perdos la tutan vivon.“

- o -

Sed ĉio bone finiĝis kaj tiu ĉi virino hejme purigis sian makulitan vestaĵon per benzino. Uzitan benzinon ŝi verŝis en necesejan ujon. Nesciante pri tio, ŝia edzo, kutimanta fumi en tiu diskreta ĉambreto, ĵetis la restaĵeton de cigaredo en ujon. Sekvis eksplodo, dum kiu brulvundis la postaĵo de la malfeliĉulo. Rapide alvokitaj sanitaristoj forportis lin sur blankardo kaj demandis lin, kiel okazis la akcidento. Dum rakontado ili tiel ekridis kaj eĉ malsanulon terenfaligis de blankardo kaj li rompiĝis al si kruron. La nekredebla historio estis poste pritraktata ĉe tribunalo pro gravaj vundoj.

- o -

Do, fine ni venis al malsanulejo.

Kuracisto diras al ĵus transportita alia paciento: „Estas klare, temas pri venenigo.“

„Kaj pri kiu veneno temas?“ demandas senespera paciento.

„Tion ni scios post la dissekco.“

Kelkaj proverboj

Pensoj iras trans limo sen pago kaj sen timo.

Laboro homon nutras, sen laboro li putras.

Ne venas honoro sen laboro.

Facile estas danci, se la feliĉo kantas.

Amo faras ion, mono ĉion.

Pli bone erari, ol nenion fari.

Ne vivu kiel vi volas, vivu kiel vi povas.

Ne uzu martelon por rompi ovoŝelon.

Restu tajloro ĉe via laboro.

Sperta mano ne restas sen pano.

Por malsanulo forto, por kokido la morto.

Vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas.

Lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn.

Post vetero malbela, lumas suno plej hela.

Kiu multe babilas, al si mem malutilas.

Vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu.

Unua bakas, lavas, flikas, dua sidas kaj kritikias.

Morto ne distingas, ĉiujn egale atingas.

Kie estas volo, tie estas vojo.

En la tago de la sankta Neniamo.

Por ĉiu plezuro devas esti mezuro.

Kiam kato promenas, la musoj festenas.

Matenas, vesperas kaj tago malaperas.

Se gut´ al gut´ aliĝas, maro fariĝas.

Pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj.

Mankas klapo en lia kapo.

Kiu mem sin adoras, nenion valoras.

Kiu ripetas abunde, lernas plej profunde.

Du militas, tria profitas.

Amo sen pano estas malbona plano.

Kiu havas abelojn, havas mielon.

Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.

Plej efika prediko estas praktiko.

Venis fino al mia latino.

Blanka bukedo

Miroslav Florián

La Frosto, maljuna ĝardenisto
surprizis min matene per malvarma bukedo
likopodiojn kaj filikojn li kunligis
sur fenestron en nehejtita ĉambreto

De kie venas praepokaj floroj?
De kiuj fremdaj kampetoj?
Milojn da strangaj glaciaj punktoj
tuj detruas la homspiroj

Eble estas la floroj neniam viditaj
kiuj volis kreski kaj atendi maturon
aŭ kisoj malpermesitaj kaj silentaj konfesoj...

Lunetulo

Tiun ĉi lernis al mi mia panjo, aŭtoro estas por mi nekonata, mi nur tradukis
al Esperanto

JoDo

Post diboĉa nokto revenas Lunulo al hejmo

Matena Stelo bela, sur krepuska nubeto,

vane lin invitas en:

„Jen, Luneto, junuleto, ne hastu tiel al hejmo!“

Trinku kun mi la glaseton, alvenu al mi, ĉi tien!“

Luneto skuis, turnis palan vizaĝon de ŝi:

„Ne, mi ne emas, amatino, hodiaŭ lasu min iri hejmen.

La nokton mi pasis ĉe Akvulaĉo en lia malpura gastejaĉo.

Diablo prenu ĉiujn for!

La falsajn kartojn portis kanajlo Jupiter.

Judulo Merkur kaj ruĝa soldato Mars

okuleton kun mi ludis

kaj dio scias, ili ne malpliriĉiĝis!

Kantis al ni kun harpo kaduka Kometino

ĉeestis Fajra Paŝo, malbenita avulino.

Kaj ĉiu nokta ĉielvaganto venis kaj je mia arĝento ebriiĝis...

O ve, o ve, mian arĝenton mi disĵetis venten

Adiaŭ, doloras la kapo, proksimiĝas la tago.

Atendas min edzino Ter', ŝi ĉagrenas, koleras, krias, tondras...

kun vipo ŝi atendas...

*Adiaŭ, la kapo doloras, jam proksimiĝas la lum', sur Lakta Vojo mi stumblas
lace sen humur'.*

Sed li ne iris hejmen, direktis al vilaĝ' Skokovy

kaj tie sur verda musko trapasis tempon ĝis krepusko.

Kvar ventoj

Ivan S. Naoumov

Staris domo en ĝardeno pruna
loĝis ĝin feliĉa familio

panjo svelta kun rideto suna

patro forta kaj la filoj trio

Viroj vivas ja por laboro vira
navas kaj bravas fiŝkaptista gent´

kun la dua filo ŝipon ŝtelis

ŝira orienta vent´

Estis forĝisto plej aĝa el tri filoj

la dua balenojn ĉasadis en mar´

dank´al tria turnadis muelpetaloj

sub la ventoj kvar

Tria filo, saĝa kaj kreema

al ĉefurbo migris por sinprovoj...

rean vojon per peniko prema

forbalailis nordo-ventaj blovoj

Sed el sudo vente venis ardo

sangodora, fera, pormilita

iris for kun glav´kaj halebardo
nova

fil´unua por esti murdita

Staras domo en ĝardeno senmova

regas la domon atendo kaj lament´

kaj demando: kion fari kontraŭ vento

de la okcident´?

La ero el la libreto „Hanaoka Seiŝu“

rakonto pri kuracisto kiu unua operaciis uzante ĝeneralan anestezaĵon

Iun tagon Kae aŭdis laŭtan ridegon de Seiŝu. Trikolora kato nomata Mafucu dormadis dum tri tagoj pro la anestezaĵo, sed kiam ĝi vekigis, ĝi subite faris transkapiĝan saltan. „Finfine vi sukcesis prepari anestezaĵon, ĉu ne? Gratulon!“ Ĉiuj reciprokis la ĝojon. Tiam jam pasis 15 jaroj, de kiam li komencis la laboron.

Tamen Seiŝu ankoraŭ ne povis apliki la preparitan anestezaĵon al homa operacio, ĉar en kato kaj homo diferencas la efiko de medikamento. Liaj patrino Ocugi kaj edzino Kae, komprenantaj lian koron, iris sinsekve al lia ĉambro kaj diris: „Donu al mi vian anestezaĵon.“ „Provu ĝin ĉe mi.“ Seiŝu ĉagrene hezitis, sed finfine li decidis provi ĝin ĉe ili. Dum multfoja provado, tre bedaŭrinde, lia edzino Kae perdis sian vidpovon.

Libreto estas verkita trilingve: japane, esperante kaj angle.

La esperanta versio de Egaŭa Harukuni

**Unu rakonto el „RAKONTOJ PRAPATRAJ - pri Nia Lando Antaŭ
Multaj Jarcentoj Kiam Okazemis Aferoj Mirindaj“**

rakontas Doko

Rondiro la Turisto

Antaŭ multaj jarcentoj, kiam la mondo estis juna, kaj kiam estis drakoj en Eŭropo, kaj kiam estis gigantoj en Azio, la turoj de la grandioza ĉefurbo de nia kara Esperantujo logis admirantojn de ĉiuj partoj de nia lando. El la nordo venis ĉasistoj, vestitaj per verdaj feloj, kiuj miris antaŭ la turoj de la urba murego, forta ŝirmilo kontraŭ la sagoj kaj kanonoj de ĉia eventuala malamiko. Ŝafistoj venis el la sudo por rigardi la belajn verdajn turojn de la reĝa kastelo. Honestaj kamparanoj venis el oriento por stari kun buŝoj malfermitaj antaŭ verdaj turoj de la centra katedralo. Bienuloj venis el la okcidento por ĉeesti spektaklojn sub la turo de la reĝa teatro. Kia granda, glora, grandioza ĉefurbo!

Ankaŭ el aliaj landoj venis vizitantoj por primiri niajn vidindajn turojn. El Volapukujo, el Interlingvujo, el Solresolujo, el Idujo, eĉ el fora Loglanujo ili venis, barbare misvestitaj, barbare misrigantaj, barbare miskomprenantaj kaj barbare misparolantaj. Ili malbone parolis nian lingvon. Ili emis osi kiam ili devis isi kaj emis isi kiam ili devis usi, kun la rezulto, ke neniu tute certis kion ili diris. Tamen ni estas popolo ĉiam tolerema eĉ al eksterlandanoj kaj do toleris ilin.

Inverse, ankaŭ niaj propraj civitanoj, scivolemaj pri la ĉirkaŭaj barbaroj, kelkfoje forlasis siajn komfortajn domojn en Esperantujo kaj vizitis la barbarajn terenojn. Inter ili, la plej fama estis la arkitekto Rondiro, kreinto de niaj famaj verdaj turoj, respektinda homo, jam de alta aĝo.

Iun jaron (kiam nia kara reĝo Ungibo estis ankoraŭ nur princo), Rondiro la turisto vizitis Loglanujon por ekzameni la historiajn turaĉojn de tiu landaĉo. Kompreneble antaŭ la aventuro li jam eklernis la loglanan, sed sovaĝan lingvaĉon apenaŭ elbuŝigeblan kiel loglanan oni nur malfacilege ellernas, kaj la loglanaj kapabloj de Rondiro la turisto estis tre modestaj. Li emis osi kiam li devis isi kaj emis isi kiam li devis usi, kun la rezulto, ke neniu tute certis kion li diris. La vortoj „antaŭ kaj malantaŭ“ estis por li iom konfuzaj en la loglana lingvo, kun la rezulto ke ofte li iris al malĝusta pordo, manĝis ĉe malĝusta tablo, aŭ pagis ĉe malĝusta giĝeto. La loglanaj numeraloj ĉiuj similis kaj li emis proponi 50 stelojn por objekto kies prezo estis nur 15.

En la loglanuja ĉefurbo li loĝis en malgranda hotelo super fama trinkejo, kiu nomiĝis *La Granda Bruo*. La bruego efektive estis ja miriga kaj malpermesis al Rondiĉo la turisto eĉ du minutojn da dormo. La duan tagon li plendis pri tio. Sed la vorto „bruo“ signifis en loglana nur „varmo“, do la hotelestro missupozis ke al li tro varmas kaj simple estingis la fajron en la hotela kameno. La duan vesperon denove la bruo malpermesis al Rondiĉo la turisto eĉ du minutoj da dormo kaj aldone kompatinda Rondiĉo la turisto preskaŭ pereis pro la malvarmo. Sed li ne kuraĝis denove plendi pri la bruo ĉar li timis eblan perdon ankaŭ de litotukoj. Post tiaj malvarmaj, bruaj noktoj, Rondiĉo la turisto sentis sin pli aĝa.

En la granda katedralo de la barbara ĉefurbo, Rondiĉo la turisto trovis belegan gastlibron kaj entuziasme subskribis ĝin. Iom strange, ĉe la supero de unu kolumno troviĝis la vorto „aĝo“. Do, Rondiĉo la turisto tre zorge enskribis sian aĝon en kolumnon. Bedaŭrinde la libro ne celis gastojn, sed kontribuontojn kaj la vorto „aĝo“ en la loglana signifas „donaco“. Per sia subskribo kaj aĝo, Rondiĉo la turisto do promesis kontribui sufiĉe grandan monsumon al la katedralo. La apuda oficisto larĝe kaj afable ridetis kiam li vidis malavaran numeron kaj postulis tujan pagon. Post tia granda elspezo, Rondiĉo la turisto, sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Tagmeze Rondiĉo la turisto penis aĉeti sandviĉon, sed bedaŭrinde, la vorto „sandviĉo“ en la loglana signifas „ŝuo“ kaj la kelnero supozante lin freneza, alportis nur vazon da akvo. Feliĉe la vorto „biero“ samas en Esperanto kaj en la loglana kaj eblis trinki tiom da biero kiom al li plaĉis. Sed post tri tagoj dum kiuj li englutis preskaŭ nur bieron, Rondiĉo la turisto sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Rondiĉo la turisto deziris viziti faman vilaĝon Ŝlejerinon por vidi la turojn de la vilaĝa muro. En tiuj antikvaj tempoj kaj tiu barbara lando ne ekzistis aŭtobusoj, sed oni povis iri de loko al loko per publika kaleŝo. Iu proponis al Rondiĉo la turisto, ke li uzu kaleŝon numero 587, sed sur neniu kaleŝo videblis la numero. Anstataŭe sur ĉiu kaleŝo troviĝis nomo de nekonata celloko. Iu diris: „Surgrimpu ĉi tiun. Ĝi vin kondukos al Ŝlejerino.“ Surgrimpis Rondiĉo la turisto la kaleŝon, sed ĝi iris en la kontraŭa direkto kaj

lasis lin en kampo kelkajn kilometrojn for de ĉiu vilaĝo. Li reiris al la ĉefurbo piede. Post tia longa marŝado, Rondiro la turisto sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Estante barbaroj, la loglanujanoj aparte amis manĝi hundaĵon, kiu estis facile havebla en ĉiu restoracio. Al Rondiro la turisto ege malplaĉis la hundaĵo kaj je ĉiu okazo li strebis eviti ĝin. Iun tagon li feliĉis kiam kelnero proponis al li pladojn „senhundaĵajn“. Avide li mendis nur „senhundaĵajn“ pladojn. Bedaŭrinde ĉiu plado enhavis do kataĵon! Post tiom da hundaĵo kaj kataĵo, Rondiro la turisto, sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Meze de la vizito, Rondiro la turisto, eksentis sin iom malsana, kun forte malagrabra sento en stomako kaj furioza diareo. Li serĉis kaj petis medikamenton kontraŭ diareo. Bedaŭrinde en loglana lingvo la vorto „diareo“ signifas „taglibro“ kaj la apotekisto proponis tion, ke se Rondiro la turisto suferas pro sia taglibro, li ne plu skribu en ĝi. Tamen, li deziris vendi ion al la fremdulo kaj do proponis al la nesuspektanta Rondiro la turisto venenon kontraŭ moskitoj kaj muŝoj, ĉar ĝuste tion deziras multaj vizitantoj en Loglanujo. La veneno gustis kvazaŭ miksaĵo de ajlo kaj koto kaj inspiris en la homo viglan vomon. Post tia vigla vomado, Rondiro la turisto, sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Iun tagon la vetero en barbara ĉefurbo estis mirinde klara, la aero estis ĝojige freŝa kaj pejzaĵo estis glorie bela. Al hazarda preterpasanto diris Rondiro la turisto: „Kia perfekta tago!“ Bedaŭrinde en la loglana ekzistas tradicia esprimo, uzata nur de ĝisostaj malamikoj: „Kia perfekta tago por via morto.“ La ŝokita loglanujano, timante tujan atakon de Rondiro la turisto, decidis, ke li plej bone tuj komencu sian sindefendon kaj kun kelkaj bubaĉoj batadis kompatindan Rondiron ĝis li ne plu certis pri la vetero. Post tia batado, Rondiro la turisto, sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Kiam li sukcesis reveni al Esperantujo, la haroj de Rondiro la turisto estis jam blankblankaj kaj lia dorso jam kurbiĝis kaj liaj piedoj jam hezitis, ĉar ĝuste tiom survoje li fariĝis pli aĝa.

Hodiaŭ kelkaj diras, ke ni esperantoj ŝajnas esti pli aĝaj ol aliaj personoj. Tio okazas survoje al foraj landoj kaj aparte ĉe turistoj. En Esperanto ni nomas la fenomenon „vojaĝado“.

Eldonejo Bero 1996 ISBN 1-882251-13-X

Paĝo 59.

El libro „Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto“

Lucien A.Peraire

La 13-an de oktobro 1928

Apenaŭ ekster vilaĝo, alparolas nin tri - kvar junaj soldatoj kaj subite tuta taĉmento nin ĉirkaŭas. La soldatoj estas ĉiuj vestitaj per longega mantelo (kapoto) dube flava; kaj unu el ili, kiu havas malgrandan triangulan insignon sur kolumo, petas niajn pasportojn.

Alia ega surprizo atendas nin: ni preskaŭ tuj konstatas, ke ne plu estas vojo! Eĉ ne tera vojeto. Kiel daŭrigi la bicikladon en tiaj kondiĉoj? Restas nur la fervojo kaj vole nevole ni estas devigitaj laŭiri la fervojan relojn, sur piedira vojeto, kiam ĝi ekzistas. Kiam ne? Tre malfacile... Kiel eble plej rapide ni informiĝas, kial ankoraŭ ne ekzistas vojoj en Ruslando. Respondo: „Ĉar ĝis nun ni ne bezonis! Ja, tre baldaŭ kaj dum ses monatoj la tuta grundo frostiĝos kaj ni profitos de la vintro por vojaĝi; dum frostegoj eĉ

riveregoj malmoliĝas kaj glitveturiloj transiras ĉie, eĉ pontojn ni ne plu bezonas!“

Mi substrekas, ke nur nordanoj tute komprenas ĉi tion; ĉar por ni, sudanoj, tio estas preskaŭ nekredebla.

Post 50 kilometroj da irado tra la fervojaj ŝpaloj mi jam ekpensis veturi per biciklo sur reloj, same kiel vagonaro. Nur post ĉirkaŭ unu jaro mia ideo estos sufiĉe matura, por ke mi efektivigu ĝin.

Julio 1930

Japanlando – vere nova mondo por mi...

Unua mirindaĵo: Sur la japana ŝipo mi estas traktata kiel... familiano, familia amiko, kvankam ĉiuj ŝipanoj, inkluzive de la ŝipestro, bone scias, ke mi estas tute senmona kaj laboruldevena.

Dua mirindaĵo: Per Esperanto mi povas komprenigi min rekte.

Tria mirindaĵo: La maro! Unuafoje mi enŝipiĝis! Kaj estis vere timige troviĝi sur vera „nuksoŝelo“ terure malgrandeta sur tiu vastego de la oceano.

Kvara mirindaĵo: La tero! Kiel malgranda ĝi aspektas al mi, kontraste kun la maro. Uf! Mi subite komprenas la ĝojon de Kolumbo, kiam li atingis Amerikon!

Kvina mirindaĵo: La japana polico donas al mi permeson surteriĝi simple, je mia vido, kvankam mi eliras el „ruĝa lando“.

Sesa mirindaĵo: Japanio mem. Kompare kun Sovetio ĝi estas pigmeja lando. Sed kia lando! Verda, pura, trankvila, ĉarmoplena, reviga lando... Mi kredis trovi la francan vaskan regionon.

Unuopaj vilaoj; mallarĝaj, pli-malpli montoplenaj urbetoj; butikoj, veraj juveloj; senmakulaj, vivantaj stratoj; ĉiam ridetantaj kaj sanoplenaj homoj kaj super ĉio, por mi fremda viro: mirinde belaj junulinoj, tiel elegante vestitaj kaj tiel ĝentilaspektaj. Ĉiuj iras nudpiede en specialaj juvelaj ŝuetoj, fiksitaj sur piedoj je la dika fingro.

Sepa mirindaĵo: En dometoj el ligno, ankaŭ juveldometoj, forestas... mebloj. La planko estas el pajlo kaj neniu eniras kun piedoj ŝuvestitaj. Por eniri en kian ajn domon, eĉ plej malriĉan, oni nepre devas sensuigi kaj purigi la piedojn, se ili estas malpuraj, ĉe akvujo kun tuko, kiujn oni speciale lasas apud ĉiuj enirejoj.

Oka mirindaĵo: En domoj forestas septoj. Ĉambretojn oni formas laŭ bezono, per bele ornamitaj paperaj septoj, sagace interpenetrantaj per reletoj ĉe planko kaj plafono.

Naŭa mirindaĵo: Ĝenerale la dometoj konsistas el ligno kaj papero kaj estas konstruitaj ekster korteto aŭ ĝardeneto, kie kreskas floroj, ĉe ŝprucakvilo kun baseneto, kie oni povas rimarki naĝantan fiŝaron kaj ofte eĉ testudon aŭ konkaĵojn kaj super ĉio akvajn kaj terajn florojn.

Nokte tiu „salono“ povas esti lumigata, transformiĝante tiel en intimejon.

Deka mirindaĵo: En ĉiu domo, eĉ en la plej malriĉa, troviĝas banujo el ligno, aŭ pli riĉa materialo, en speciala banejo. Ĉiuvespere ĉiuj familianoj ofte sin banas tute nude kaj samtempe. (En tiu epoko ĉe ni komencis nur aperi hejmaj banujoj).

Dekunua mirindaĵo: Ĉi tie jam en 1930 ĉiu familio havas sian radio-aparaton.

Dekdua mirindaĵo: En domo neniu seĝo! Por skribi, manĝi kaj ĝenerale oni sidas sur kruroj, rekte sur la planko, sammaniere kiel en Okcidento laboras la tajloroj.

Dektria mirindaĵo: Sur la strato svarmas bicikloj kaj duradaj ĉaretoj trenataj de viroj. Ankaŭ trotuaroj ofte malaperis, tiom mallarĝaj estas la stratetoj; precipe kompare kun Sovetio, kie la plej simpla strato similas okcidentan bulvardon. La kaŭzo de tio estas la malsimileco inter la skaloj de ambaŭ landoj: unu vastega, la alia malgranda.

Dekkvara mirindaĵo: En Japanio neekzistas ksenofobio. Ksenofobio, kiun mi foje renkontis en Ĉinio... Kontraŭe ĉiuj de la plej granda altrangulo ĝis la simpla knabo min salutas ridante.

Dekkvina mirindaĵo: Iu esperantisto min alparolas meze de strato kaj min invitas... trinki teon. (La trinkado estas sola komuna moro inter rusoj kaj japanoj kaj ĉe ambaŭ popoloj ĝi esprimas amikan, ecx intiman gastaman ceremonion). Servas min gracia kaj ridetanta junulino, genuflekse, belege vestita per ne malpli belega kimono kun papiliforma banto.

Deksesa mirindaĵo: Finfine la ŝipoestro prezentas min al poliestro, kiu parolas ruse tiel malbone kiel mi, sed tamen ankaŭ min akceptas kiel amikon. (La postan jaron, kiam mi alvenos en Hindoĉinion, jen la unua parolo de franca poliestro: „Vi estas por mi nur vagaĉulo, laŭvorte kaj honorparole...“)

La libreto estas tradukita al ĉeĥa lingvo de J.Drahotová.

. Pacjo, kio estas rasismo?

La peceto el la libreto de Tahar Ben Jelloun „PAĈJO, KIO ESTAS RASISMO?“

Interparolo de patro al lia dekjara filino

„Kiu estas eksterlandano?“

„En tiu vorto eksterlando vi aŭdas „ekster“, kiu signifas ekstera, fremda al.

Ĝi montras tiun, kiu ne estas de la familio, ne apartenas al la klano aŭ tribo; iun kiu venas el alia lando, ĉu proksima, ĉu malproksima, eĉ foje el alia urbo aŭ alia vilaĝo. Tial, oni ankaŭ diras „alilandano“, „aliulo“, „fremdulo“. Ekzistas nomo por tiu malsaneca malamo al la alilanduloj: ksenofobio.“

„Kiam mi iras al mia kamaradino al Normandion, ĉu tiam mi estas fremdulino?“

„Por la tieaj loĝantoj, jes, senkonteste, ĉar vi venas de alia loko, Parizo, kaj plie vi estas marokdevena. Ĉu vi memoras kiam ni vojaĝis al Senegalio? Nu, ni estis eksterlandanoj por la senegaloj.“

„Sed la senegaloj ne timis min kaj reciproke!“

„Jes, ĉar via panjo kaj mi mem klarigis al vi, ke vi ne devas timi aliulojn, riĉajn aŭ malriĉajn, grandajn aŭ malgrandajn, blankajn aŭ nigrajn...“

„Oni ne naskiĝas rasista, oni iĝas tia. Edukado estas bona aŭ malbona. Ĉio dependas de tiu, kiu edukas, ĉu en lernejo, ĉu en la hejmo.“

„Nu, besto, kiu ricevas neniun edukadon, estas pli bona ol homo!“

„Ni diru, ke besto ne havas antaŭstarigitajn sentojn. La homo male, homo havas kion oni nomas antaŭjuĝoj. Li juĝas la aliajn antaŭ ol koni ilin. Li kredas antaŭscii kiaj ili estas kaj kiom ili valoras. Ofte li eraras. Tial li timas. Kaj por venki sian timon, foje, la homo ekmilitas. Sed, kiam mi diras ke li timas, ne kredu ke li tremas; male, lia timo kaŭzas lian agresemon, li sentas sin minacata kaj tial li atakas. Rasisto estas agresema.“

„Mi komprenas. Rasisto timas sen kialo.“

„Li timas la eksterlandanon, tiun kiun li ne konas, ĉefe kiam tiu ĉi eksterlandano estas pli malriĉa ol li. Li pli malfidas afrikan laboriston ol usonan miliardulon. Pli bona ekzemplo: kiam emiro el Arabio venas al Lazur-Bordo pasigi feriojn, li estas plenbrake akceptata, ĉar tiam oni akceptas ne la arabon, sed riĉulon kiu elspezas sian monon.“

El la franca al Esperanto tradukis Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil.

Ero el la libro „Kromozomoj“

Lorjak

Bernard Dubosk ne tre varme akceptis perspektivon iri ĉe la biologoj veki scivolojn. Sed ĉar tia iniciato jam estis plurfoje elvokita – ankaŭ ĉar evidente ĝi turmentus lian edzinon ĝis sia efektivigo – reankaŭ ĉar li sufiĉe konis ŝin por scii, ke ŝi ne ignoros ĝin antaŭ ĝia plenumo kaj senlace relevos la demandon, li mem aludis ĝin je sekvanta tago:

„Mirela! Ĉu vi ideas pri laboratorio, kiu povus kontentigi vin, realigi vian iniciaton?“

„Tute ne. Supozeble ĝi devus esti alte specialigita. Ni vidu en la adreslibro de la telefono...”

La nura konsulto de tiu jarlibro nenion povis alporti pozitivan. Nek pluraj telefonvokoj, ĉar la vokitoj rezignis pro nekompetento. Sed ĉiuj kondukis al tiu konsilo, ke la „paciento“ komence vizitu sian kuraciston, tial ke laboratoriajn esplorojn oni ne entreprenus sen ties preskribo. Konsilo, kiun Mirela logike subtenis:

„Evidente! Tiom pli, ke ni nenion komprenus el la rezultoj sen klarigaj komentoj.”

Sekve de tio, Bernard rendenvuis kun sia kuracisto, Dr. Menoret, al kiu li sukcesis prezenti sian demandon sen malkaŝo de la familia sekreto. Li eĉ kapablis ludi subtilan komedion de medicina scivolemo:

„Kara doktoro, vi certe miros pro la motivo de mia vizito. Eble vi mokos min. Aŭ opinios, ke mi perdigos vian tempon. Sed mi konfesas, ke sub la lavango de sciencaj komunikoj, kiujn distribuas la gazetoj, ankaŭ fronte al la konstanta progreso de la homaj scioj, kiujn ili spegulas, mi sentas min ĝisrande plena de meminstruaj demandoj.”

Li haltis por kontroli el ties vizaĝo, ĉu tiuj antaŭparoloj ne blokos la servemon de la doktoro, kiu havas pli urĝajn okupojn ol komplezi la sciencajn alsopirojn de vizitantoj. Tamen, ĉar la okuloj de la kuracisto esprimis pli da surprizo ol da malfavoro, li kuraĝis daŭrigi:

„Jes. Kiel preskaŭ ĉioma homaro, min turmentas demandoj: Kio estas mi? – De kie mi venas? – Kien mi iras? – Pli flanke: kia povas esti la fonto de miaj profundaj inklinoj?”

Bernard hezitetis. Kaj:

„Mi aŭdis en radio prelegon pri kromozomoj. De tiam mi perpleksas, ĉu tie ne kuŝas la respondo al miaj demandoj?”

Abrupte frontita, la doktoro eligis tuseton:

„Vi iom embarasas min. Pri la kromozomoj miaj umoj ne tre fortas. Mi ne multe scias pri tiu temo; miaj scioj ne estas pli vastaj ol viaj. Ja miaj cxiutagaj taskoj centfoje pli ofte konsistas el la detekto de pulmaj rasloj kaj miaj observoj el la efiko-komparo de siropoj kontraŭ la tuso, ol el studoj pri nukleoproteinoj. Mi ne estas biologo.“

Li denove silentis. Medite ekzamenis sian klienton, antaŭ ol sugesti:

„Se vi nepre deziras pliprofundi la demandon, jen kion mi proponas al vi. Mi faros al vi sangoprenon kaj tiun specimenon sendos al specialistoj por analizo. Ni kune studos iliajn konkludojn.“

Tiu propono plene respondis al la neesprimita espero de Bernard Dubosk. En formo de muta konsento li demetis sian jakon, relevis manikon kaj prezentis sian nudan antaŭbrakon al la nadlo de la malinjektilo.

Libro estas tradukita al la ĉeĥa de J.Drahotová

Ero el la libro „Verda koro“

Julio Baghy

Postparolo de la verkinto

Post la tralego de la romaneto certe troviĝas inter la legantoj, kiuj havas impreson: la historio ne estas tute fantazia. Ili pravas. Mi superpaperigis memoraĵojn, kiuj restis vivaj en mia animo. La verkista fantazio malmulte laboris.

Vere, la romanfiguroj ekzistis kaj multaj el ili ankoraŭ vivas. Kelkaj plenumas la solenan promeson, faritan en la „Esperanta Kafejo“, kelkaj aktive ne povas partopreni en la kultura batalo pro diversaj kaŭzoj, sed ĉiuj

restis fidelaj al la „*ideo*“. Mi konservis multajn verajn nomojn. Nur ĉe tiuj fuguroj mi uzis pseudonimojn, ĉe kiuj la konsideroj pri cirkostancoj konsilistion al mi aŭ pri kies fremdlingva nomo mi ne povis bone rememori.

Preskaŭ du jardekoj pasis. Kuratov kaj la bona Bogatireva forlasis nian mondon, ankaŭ pro kapitano Oba la japanaj samideanoj jam havis funebbron. Marja Bulski eble nun vivas en *Mukden* kaj laboras por siaj orfaj gefratoj. Pavel Budinka vigle laboras, Janis Lekko, se miaj informoj ne mensogas, estas profesoro en iu alta lernejo en Ruslando. Vonago revenis al sia patronlando: al Polujo. Mihalik estas landa prezidanto de la Hungara Esperanta Federacio. Ŝaroŝi komponis ankoraŭ multe da melodioj, Zinner loĝas en Vieno... kaj por Sunfloro vi forviŝu la bedaŭron! Ŝi vivas kun sia Koluŝ kaj ŝi estas mildkora patrineto de tri tre ĉarmaj ekzotike belaj infanoj. Mi renkontis ilin en... Ne, tio estas *ilia* sekreto. Koluŝ estis pli kuraĝa ol Nadai, kiu same vivas ie, iel.

Kaj nun ankoraŭ kelkajn vortojn pri tiu ĉi modesta libreto mem. Mi konfesas, ke mi verkis ĝin nur por plenumi deziron ofte ripetatan kaj direktatan al mi. Literaturajn pretendojn mi ne havas por ĝi. Tamen mi havas peton al la kritiko la unuan fojon mia vivo: konsideru la malfacilaĝojn, kiujn verkisto havas, kiam li devas lukti konstante pro manko de la vortoj kaj ĉiumomente pripensi, ke tiun aŭ alian gramatikan regulon la leganto ankoraŭ ne lernis.

Mi deziras doni ne „*majstran verkon*“, sed **simplan legolibron** kun grandigita stilo al niaj novaj samideanoj, pri kies lingva nivelo ni, verkistoj, ĉiam forgesas en la momento de la inspiro kaj lingvokreado. Mi deziras enmanigi tian verketon al la novaj adeptoj, kiu libro entenu iom el tiu neestingebla fajro, kiu donas koran varmon al mi kaj al la multaj dekmiloj en la mondo, kie hodiaŭ regas ĥaoso kaj en kiu la minaca ombro de nova milito, pli terura kaj pli eksterma ol antaŭa, malheligas la revoteksan optimismon de la homoj. Mi volis prezenti simplavorte al ili konsolan realecon de la pasinto... kaj fine mi volis prepari la **duan** ŝtupon por tiuj, kiuj iam lernis en la *Ĉe*-metodaj kursoj legante „*Nik Nek kaj Kat Jen*“, mian porkursan gajan rakonteton el la „*Konversacia Literaturo*“. Ĉu la dua ŝtupo plaĉos al ili, mi

ne scias, sed mi klopodis fari ĝin taŭga, fortika por doni al ili faciligan eblecon progresi plu en la lingva evoluo.

Mi deziras al vi, kiuj honoris tiun ĉi verketon per atenta tralego, ke la varmo de la verdstela koro de Iĉio Pang veku en vi komprenon kaj kuraĝan laboremon pri kaj por tiuj faktoj, kiuj hodiaŭ montras la vivantecon de nia lingvo. Konsideru vi, novaj gesamideanoj, ke hodiaŭ nia lingvo havas organizitajn neŭtralan kaj laboristan movadojn, viglaj naciaj societoj klopodas utiligi la lingvon en ĉiu medio de la homa socio, ni havas centran organizon, internacian instituton por la instruado, konstante riĉigantan literaturon, fakajn organizaĵojn kaj el tio ĉerpu la fortan kredon, ke Esperanto estas *neelsirebla* plu el la vivo, ĉar la Vivo mem postulas por si la latinon de la modernaj tempoj: *nian belan lingvon*.

La libron el Esperanto en ĉeĥan tradukis J.Drahotová.

Ero el la libro: „Kredu min, sinjorino!“

Cezaro Rossetti

Iun dimanĉmatenon mi renkontis Benjon laŭ antaŭaranĝo, por viziti Petticoat Lane, la faman Londonan bazon. Estis bela, varma mateno. Ni atingis Petticoat Lane proksime de la deka. La bazon estis tiom plena de homoj, ke ni devis puŝiĝi inter ili kaj zorgi por ne perdi unu la alian. Ĉiu strato estis kontinue borderita ambaŭflanke per standoj, kaj ankaŭ la stratbutikoj estis malfermaj. La bazaristoj hurlis pri siaj varoj, kaj la butikistoj staris ĉe la sojlo, provante per ĉiu rimedo enirigi klientojn. Preskaŭ

ĉiu speco de varo estis aĉetebla, „de pinglo ĝis ankro“, kiel diras la angla esprimo.

Ni kuniris malrapide, aŭskultante la bazaristojn deklami. Inter ili mi rekonis kelkajn bazarulojn, kaj kelkfoje mi agis kiel „sprono“ por ili. „Sprono“ estas proksimuma traduko de bazarula vorto, kiu signifas iun, kiu per ekzemplo instigas la klientojn aĉeti. Necesas nur, ĉe la fino de bazarula parolo, kiam li diras prezon, ke mi tuj aĉetu. Tio komencigas la aĉetadon. Poste mi redonas kaŝe la aĉetaĵon kaj ricevas monon.

Ĉe la vojrandoj staris viro, kiu vendis faskojn da mento. Dum mi preterpasis, li ŝovis la faskon al ni, kriante: „Mento po du pencoj por fasko, mento po du pencoj por fasko!“, riripete. Ĝuste tiam, terno neatendite skuis Benjon, kaj ŝi ternis rekte sur la etenditan faskon. La mentvendanto ne paŭzis nek movis eĉ palpebron, sed daŭrigis: „Mento po unu penco por fasko, unu penco por fasko...“

Ni puŝiris laŭ la stratojn. Benjo interesiĝis pri virinaj vestaĵoj kaj faris du-tri aĉetojn. Inter ili estis paro da silkaj ŝtrumpoj, kiuj estis malaltprezaj. La bazaristo montris ilin al ŝi, turnante ilin en mano, por ke ŝi bone vidu ilin. Ŝi poste rimarkis, ke la fortikigita kotona rando ĉe la supro de unu etendiĝas preskaŭ ĝis la genuo.

Ankoraŭ ŝi ne scias, kiel ili estis manipolitaj, ke ŝi ne vidis la okulfrapan difekton.

Subite Benjo diris: „Kion vendas tiu hindo?“ Mi rigardis. Li ne estis hindo. Tio estis videbla. Li estis ŝminkita. Ni alproksimiĝis. La „hindo“ portis pseudo-orientan vestaĵon, sidis sur tapiŝo kun la kruroj krucitaj kaj diris monotone per kvazaŭ-fremda fuŝparolo: „Bonŝanca nigra fabo, faras bonŝance, multe bonŝance, nur po tri pencoj.“ Li tenis la rigardon teren kaj apud li estis cizelita latuna pleto plena de nigraj faboj. Li vendis unu-du tiam kaj tiam, precipe al virinoj. Dum mi rigardis, mi trovis ion konatan ĉe li, kaj mi rekonis lin. Estis Bert, la „specimenisto“, kiun mi renkontis en Edinburga

foiro. Post momento li leviĝis kaj aĉetis tason da teo ĉe apuda stando. Mi alproksimiĝis: „*Kaisa hai, sahib*, granda ŝanĝo post la specimenvendo!“

„Jock!“ li diris. „Kiel vi fartas? Kio logis vin al ĉi tiu ĝangalo?“

„Ĉio iras glate ĉe mi. Kiel ĉe vi?“

„Ho, kiel kutime, enspezo kaj elspezo.“

„Ĉu tio estas via nova entrepreno?“

„Ne, mi laboras ĉe foiro dum semajno, kaj se la vetero estas afabla dimanĉe matene, mi venas ĉi tien.“

„Ĉu vi multe enspezas per faboj?“

„Ne multe, sed la kosto de la faboj kaj iom da tinkturo ne estas multo.“

„Mi certe ne estus kredinta, ke oni aĉetus fabojn unuope, kaj je tia skandala prezo!“

„Ho, la publiko aĉetas iom ajn. Ju pli trompa la varo, des pli oni aĉetas. Tamen estas io, kio igas la fabojn karaj.“

„Kio?“ mi demandis.

„Mia *pluso*,“ li respondis. „Kiam mi komencis, mi provis fari paroladon pri la faboj, sed eltrovis ke la publiko ne kredas min. Ĝi estis bona fabelo: pri la deveno de la misteraj nigraj faboj kaj citoj pri la granda bonŝanco, kiun ili venigas, sed – nenio: do mi decidis provi diri nenion, krom fuŝdiri kio ili estas. Kaj la homoj aĉetas. Eble ili iom hontis, kiam ili estis inter amaso, kiun mia parolado kolektis. Ĉu aŭ ĉu ne, - ili aĉetas unuope.“

„Vi havas pli da kuraĝo ol mi. Mi ne kuraĝus tion fari, precipe se mi havus helbluajn okulojn.“

Benjo kaj mi plu promenadis. Ni vidis iun, kiu estis laŭte deklamata. Sur sia vendobenko li havis kapon de moruo, kaj sur ĝi estis grandeta pilolo diskoforma.

„Gesinjoroj,“ li deklamis, „rigardu la muŝojn! Ili estas ĉie sur la stando, sed neniu – eĉ ne unu sola – alproksimiĝas la fiŝkapon. Jen unu pundo! Tion mi volonte donos al iu ajn, kiu unua vidos muŝon resti sur la fiŝo. Gesinjoroj, tiu pilolo ŝirmos vian manĝaĵon kontraŭ muŝoj kaj ĉiuspecaj insektoj. Nur metu unu en vian kuirejon aŭ manĝoŝrankon kaj vi forigos la danĝeron kuin portas muŝoj. Muŝoj infektas... .. ktp.“

Ni formoviĝis. Neniam antaŭe mi vidis tiun pilolon, sed mi aŭdis pri ĝi. Laŭdire oni simple fandas kandelajn kaj muldas la fandaĵon je pecoj de iu ajn formo. Kelkfoje oni koloras la fandaĵon per blua aŭ ruĝa inko. La muŝoj ne proksimiĝas al la fiŝo, sur kiu estas la pilolo, ĉar la fiŝo estas antaŭe trempita en petrolon.

La libron en la ĉeĥan tradukis J. Drahotová.

Peceto el la libro „ILI VIVIS SUR LA TERO – ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo“

geedzoj Maryvonne kaj Bruno Robineau

En Subotica, Jugoslavio, eta kaj maljuna blankbarba sinjoro akceptas nin en stranga domo-muzeo. Nia gastiganto aspektas kiel honorinda profesoro emerita. Kaj tamen, Tibor Sekelj, 75-jara etnologo, vojaĝanto,

verkisto-ĵurnalisto, delegito ĉe Unesko kaj esperanto-parolanto, pasigis preskaŭ kvindek jarojn de sia vivo traitante la mondon. Li renkontis kanibalajn tribojn, apenaŭ eskapis la kaptranĉistoj en Borneo, fariĝis jogano kaj kvietigisto de serpentoj en Hindio, frandis ter-vermojn kun la indiĝenoj de Nov-Gineo, kaj tiel plu kaj tiel plu... Li verkis tridekon da librojn pri sia aventurplena vivo, tradukitaj en plurajn lingvojn, inter kiuj japanan. Solida poligloto, li lernis ne malpli ol dudek kvin lingvojn dum sia vivo. Li nun flue parolas naŭ el ili kaj estas i.a. membro de la Akademio de Esperanto.

Lia domo estas vera muzeo de memoraĵoj pri liaj aventuroj. Ni dormis en ĉambro, kie maskoj de la kvar anguloj de la mondo rigardis nin de ĉiuj muroj per strangaj grimasoj.

„Nun kiam mi estas maljuna mi povas de pli fore taksi mian vivon kaj fari sintezon. Mi konstatas, ke fakte tra miaj aventuroj mi provis pli bone koni la homojn, kompreni ilin super eventualaj malsimilaĵoj, kaj atingi interamikiĝon. Kompreneble, la kap-tranĉistoj provis mortigi min, sed tio ne pruvas, ke ili estas malbonaj: simple ili obeis iajn praaajn leĝojn, kaj tio neniel malgrandigas mian amikecon al ili. Neniam mi ekiris kiel konkeranto, sed ja kiel amiko vizitis la montojn, la dezertojn, la kanibalajn tribojn, la diversajn popolojn. Se ili ne akceptis min, tio signifas, ke ili ankoraŭ ne pretis: mi devis atendi ĝis ili malfermiĝos... Kaj mi precipe lernis, ke la eksteraĵo neniel gravas; gravas la homa animo, sub la militaj farboj, malantaŭ la kutimoj kaj la moroj, kiom ajn fremdaj unuavide por eŭropano.“

Tibor Sekelj plu agemas malgraŭ sia granda aĝo. En 1985, dum la ĝenerala Sesio de Unesko en Sofio, li sukcesis adoptigi tre pozitivan oficialan deklaron por Esperanto. Krom siaj agadoj en la esperanto-movado, li ofte ricevas invitojn por prelegoj, kies centra temo estas la amikeco inter la popoloj. Vere tre simpatia kaj stimula halto por vojaĝantoj! Ne necesas diri, ke Tibor Sekelj forte kuraĝigis nin por nia entrepreno.

Post petvetura trapaso de Jugoslavio sub la neĝo, jen ni ree en Ateno por aviadile iri al Hindio, al Azio, al alia mondo, kiun ni antaŭ longe deziris koni.

La unuan de januaro, ni simple bondeziris: 1987 estu tiel riĉa kaj feliĉa kiel 1986.

Ateno, januaro 1987.

La libron vi ankaŭ povas legi en ĉeĥa lingvo, danke al laboro de J.Drahotová.

De serio „Unu tero, multaj kulturoj - Sur kamparoj de l'mondo (4)“

Maryvonne kaj Bruno Robineau, MONATO 2001.

Suka kollu: la espero estas miljara

Je la sojlo de la 21-jarcento la kamparanoj en bolivia altebenaĵo ree praktikas forgesitan miljaran teknikon. Neregistaraj organizaĵoj kaj internaciaj agentejoj estas ne malmultaj en Bolivio. Iliaj agronomiaj inĝenieroj, kiuj tre bonintence alvenas kun, en siaj pakaĵoj, plibonigitaj semoj kaj sterkoj, ofte senkuraĝigite foriras: ne, nenio farebla ĉi tie, tro malmilda estas klimato, tro malriĉa estas la tero. Kaj tamen ne ĉiam tiel estis!

Tivanaku verŝajne belege aspektis kun siaj majestaj piramidoj, siaj temploj, siaj skulptitaj bareliefoj orkovritaj. La ĉefurbo situis ĉe la koro de imperio etendiĝanta de la nordo de Ĉilio ĝis la spronoj de la amazoniaj arbaroj de Peruo en la 11-a jarcento de nia erao. Poste alvenis inkaaj invadantoj kaj hispanaj konkeristoj; forgesiĝis Tivanaku kaj ĝia monumenta ĉefurbo.

Ekkono de arkeologoj

Laŭ Allan Kolata, usona arkeologo kaj bolivia kolego Osvaldo Rivera, ambaŭ edukitaj ankaŭ kiel agronomoj proklamas, ke la urbo Tivanaku ĉe sia apogeo verŝajne nombris 120.000 loĝantojn kaj la loka agrikulturo produktis kromaĵojn, kiuj ebligis teritorian kaj kulturen ekspansion de la imperio. Sed kiel urbo kapablas nutri sian loĝantaron en tiu dezerta pampo, submetata al ĉiuj severaj veterkondiĉoj, kie la kultivaĵoj frostiĝas mezsomere aŭ estas inundataj de la salhavaj akvoj de la lago? Nuntempe la pampo de Koani eĉ ne kapablas nutri la 7.000 loĝantojn, kiuj en La Paz iom post iom densigas la fluon de senlaboruloj.

Robert Cruz verŝajne ne troviĝos inter ili, ĉar li ree esperas pri agrokulturo de post tiu tago, en 1987, kiam li renkontis Allan Kolata kaj Osvaldo Rivera, kliniĝantaj sur liaj kampoj. Ambaŭ nekonatoj rakontis al li strangaĵojn: ke lia tero, nun uzata nur por nutri liajn lĵamojn, verŝajne estis tre fekunda; ke la strangaj termontoj, kiujn li ĉiam konis, kaj kiuj donis al la pejzaĝo la aspekton de giganta onda lado, estis la postrestaĵoj de sistemo de platformoj apartigitaj de kanaloj; kaj ke li povus revivigi ĉion ĉi kaj ree produkti ĉi tie terpomojn. Tiam temis nur pri hipotezo; necesis ĝin kontroli.

Roberto Cruz konvinkiĝis provi la eksperimenton kaj prisemis unu el tiuj platformoj ĉirkaŭataj de kanaloj, kiuj estis rearanĝitaj – unu *suka kollu*, ajmara termino, kies signifo estas „plialtigita kampo“. Tamen, iun februaran nokton (do dum sudhemisfera somero), okazis tio, kion li tiom timis: severa frosto. Matene la kamparanoj konstatis, ke difektiĝis 90 % de ilia rikolto de terpomoj. Kiam siavice Roberto malsupreniris en sian *suka kollu* por konstati la damaĝojn, li tre miris, vidante, ke blanka nebuleto kovras lian kampon, „kvazaŭ kovrilo sterniĝanta je 90 cm super la grundo“. Ankoraŭ pli granda estis lia surprizo, kiam li konstatis, ke liaj plantoj multe malpli suferis ol en la apudaj kampoj. Kelkajn monatojn poste li engarbejigis rekordan rikolton. Tio estis unua rearanĝita *suka kollu*; nuntempe ili ampleksas 128 hektarojn en 53 vilaĝoj.

Retrovi scion

En tiu „kovrilo“ de nebulo, kiu tiel efike protektis la rikolton de Roberto, kuŝas la genio de la *suka kollu*. Ĉar la altebenaĵo havas sunplenajn tagojn, la akvo de la kanaloj varmiĝas; kiam ĝi vaporiĝas, la miksiĝo de la vaporo kun nokta malvarma aero formas tiun nebulan kovrilon, kiu ŝirmas la plantojn kontraŭ frosto.

La agronomo Juan Ramirez ĉeestis, kiam okazis unua rikolto en la *suka kollu* de Roberto Cruz. Pri tio li memoras, kvazaŭ estus okazinte hieraŭ: „Skandale altaj estis la rendimentoj. Estis proksimume po 23 tuberoj por ĉiu plantaĵo, dum ĉi tie oni ĝenerale ricevas nur po kvin aŭ ses. Konvinkitaj kamparanoj kisis la terpomojn. Por ili tiu rikolto signifis pluvivi.“ Efektive la kamparanoj neniam vidis tion: rendimentojn de 20 t/ha, preskaŭ dekoblo de tio, kion ili kutime ricevas! Kaj poste konfirmiĝis la rezultojn. Tiuj *suka kollu* ankaŭ produktas bonajn rezultojn por aveno, hordeo, cepoj kaj faboj.

Fido al praavoj

Osvaldo Rivera kaj Allan Kolata tre ĝojas pro tio, ke ilia laboro de arkeologoj donis esperon al multaj kamparanoj, rehavinte al ili la teknologion de iliaj praavoj.

„De jarcentoj ni bolivianoj opinias, ke tio, kio venas de eksterlando, estas pli bona, kaj ĉiam de eksterlando oni serĉas solvon al niaj problemoj. Tio naskis ian mensan dependecon. Ĉi tie ni povas redoni al la kamparanoj fidon al siaj praavoj, al si mem, por ke retrovu sian propran valoron. Jen la fundamenta bazo de la evoluado“, konkludas Osvaldo Rivera.

En tiuj *suka kollu* la andaj kamparanoj ĉefe vidas plian pruvon de sia kutimiro: „Necesas antaŭen iri, rigardante la pasintecon.“

Pri siaj spertoj dum okjara vojaĝo tra la mondo la aŭtoroj terkulturistoj - detale raportas en sia libro *Ili vivis sur la tero* mendebila ĉe FEL. La libro estis tradukita al ĉeĥa lingvo, eldonita de Volvox Globator.

Tri eroj el la lernolibro „Vojaĝo en Esperanto-Lando“

Boris Kolker

Kiel mi fariĝis esperantisto

Mi tute ne volis esti esperantisto. Mi malŝatis la ideon de artefarita lingvo. Mi argumentadis kontraŭ ĝi, diskutante kun mia amiko kaj kolego, fervora esperantisto.

Li volis konvinki min pri alta kvalito de Esperanto kaj pri neceso de neŭtrala lingvo internacia. Sed laŭ mi Esperanto estas nur surogato kaj nekapabla esprimi delikatajn sentojn – kaj ĝi ne taŭgas kiel lingvo de scienco, diplomatio kaj poezio. Tiel mi argumentis energie kaj brave kontraŭ mia amiko kaj klopodis ridindigi la objekton de lia granda amo.

Li brave defendis sian aferon, sed mi, nekonate la faktojn, evidente „sciis“ pli bone ol li.

Jam longe mi miris pro tio, ke li – prudenta homo kaj inteligentulo – deziras okupi sin pri tiom naiva ideo kaj perdi sian valoran tempon por tia stultaĵo.

Tion mi diris al li, diskutante, kaj mi konsilis al li forĵeti sian absurdan ideon de artefarita lingvo: „Tia lingvo ja ne vivas; ĝi ne havas jarmilan evoluon kiel naciaj lingvoj. Al ĝi mankas la forto kaj la suko de vivo... kaj ne kredigu min, ke dek ses reguloj povas krei lingvon plene kapablan esprimi ĉion, kion pensas la homa cerbo...“

„Vi parolas pri io, pri kio vi scias nenion. Vi pensas, ke Esperanto estas tia, kia vi diras. Vi diskutas pri afero, pri kiu vi scias nepre nenion. Oni povas diskuti nur pri temoj *konataj*. Tial mi petas vin kunpreni ĉi tiun lernolibron kaj ĉi tiun broŝuron pri Esperanto. Tralegu ambaŭ. Post tio revenu. Tiam ni havos bazon por diskutado.“

Tiel parolis al mi mia amiko antaŭ multaj, multaj jaroj. Tuj la vortoj ŝokis min, ĉar verdire, li pravus, dirante, ke oni povas diskuti nur tion, pri kio oni scias almenaŭ ion. Tro ofte oni emas esprimi sian „pretan“ opinion, kvankam oni ankoraŭ ne havas eblon por studi kaj pripensi la temon.

Tiuj vortoj antaŭ multaj, multaj jaroj fariĝis mia sorto, ĉar mi akceptis inviton je vortduelo kaj prunteprenon de la proponitaj libretoj.

Hejme mi eksidis por fervore kaj energie studi la materialon. Mi prenis krajonon en la manon por noti multajn punktojn de kritiko kaj kondamno. Mi volis prepari min por vigla diskuto kaj komplete konvinki lin, ke ne li, sed mi pravus.

Sed... mia krajono nenion notis, nenion kondamnis. Ju pli mi legis, des pli kaptis min la strukturo de la lingvo kaj la genia konstruo de la gramatiko. Mirigis min la sistemo de vortfarado, la simplaj tempoformoj de la verbo, la praktika solvo de la akuzativo, la korelativa sistemo ktp.

Unu horo pasis post la alia. Komence mi nur observis, sed poste mi ankaŭ lernis, studis, klopodis memori. Ne daŭris longe, ĝis mi komencis entuziasmiĝi pro la lingvo mem... kaj poste ankaŭ pro la interna ideo. Saŭlo fariĝis Paŭlo, malamiko fariĝis amiko.

Pasis unu semajno, eble kelkaj tagoj pli. Mia amiko-kolego kaj mi renkontiĝis laŭ interkonsento. Mi tuj redonis al li la librojn. La enhavon de la lernolibro mi jam sciis. Li miris, kiam mi petis rigardi lernolibron por progresantoj. Li bezonis kelkajn tagojn por plene kompreni, ke mi efektive fariĝis esperantisto kaj... ke mi intencas stari ĉe lia flanko en la paca batalo por disvastigi Esperanton kaj la scion pri ĝi.

Kaj vere: tiel okazis. Strange: kelkajn jarojn poste li fariĝis malpli aktiva, kaj post kelkaj pliaj jaroj li plu ne okupis sin pri nia afero. Ofte oni miras, ke io tia estas ebla; ke flamo, tiom arde brulante, povas estingiĝi... sen ia videbla kaŭzo! Mi suspektas, ke kaŭzo estas lia edzino... ĵaluzo. Poste mi spertis, ke ofte ĵaluzo de edzinoj aŭ edzoj kaŭzas malaktivigon, aŭ eble eĉ, ke li aŭ ŝi tute forlasas la movadon.

Io tia ne okazis al mi, ĉar mi edziĝis al samideanino, kiu estis ne nur aktiva, sed ankaŭ entuziasma por nia afero. Kaj ĉar ŝi estis eksterlanda, ni interparolis nur esperante. Tiel ni spertis, ke Esperanto taŭgas ankaŭ kiel hejma, kiel familia lingvo.

Kiel sekretario de nia landa Esperanto-instituto, kies ĉefa celo estis inviti eksterlandajn Cseh-metodajn geinstruistojn kaj organizi iliajn kursojn, mi havis la taskon kontakti ĉiujn persone, kaj plej ofte tio okazis en mia hejmo. Kia feliĉo, ke mi havas edzinon, kiu estas samideanino, kaj kiu povas perfekte kaj flue konversacii kun ĉiu verdstela gasto. Ni gastigis en nia hejmo esperantistojn el preskaŭ ĉiuj landoj, el preskaŭ ĉiuj kontinentoj. Imagu, kiom riĉa sperto paroli kaj diskuti kun anoj el tiom da nacioj! Nur per Esperanto ni havis tiun riĉan sperton. Nur per Esperanto tio estas ebla.

L.Friis. Eldonisto konfesas // Sub la signo de la verda stelo. –
Åbyhøj, 1964, p. 7-9. Mallongigita.

Neologismoj – por kaj kontraŭ

Zamenhof mem estis tre tolerema kontraŭ neologismoj, li avertis sole: „ne tro krude, ne tro multe per unu fojo“. Jen kelkaj citaĵoj de li: „mi havas nenion kontraŭ la enprenado de tiuj vortoj“; „neologismoj... nenion ŝanĝante, nek rompante, prezentas por lingvo nenian danĝeron“; „Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen danke al la *reguleco* de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas sian kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua“; „Vi diras, ke la aperado de novaj vortoj faras la lingvon pli malfacile ellernebla. Sed kial? Ili ja tute ne elpuŝas la antaŭajn vortojn kaj ne ŝanĝas en io la ĝisnunajn principojn de la esperanta vortfarado“.

K. Kalocsay

Neologismo. // Enciklopedio de Esperanto. – Budapeŝto, 1979, p. 390-391.

Mallongigita.

Pri nacionalismo

Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devas esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj – kiel natura sindefenda reago – estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed se la nacionalismo de fortuloj estas ne nobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala.

L.L.Zamenhof.

Por kaj kontraŭ reformoj

(Plena verkaro de Zamenhof, kajero 8) –

Kioto, 1980, p. 88-90. Fragmento.

Temas pri unika rekomendinda lernolibro.

El la libro „Rakontu samideano...“

V. Setälä, Finnlando

Doktoro Fiŝer rakontas

Vojaĝante al ekstrema oriento mi sidis en restoracia vagono de Bukaresto al Konstantinopolo. Mi observis, kiel iu eksterlandano vane penas paroli al kelnero. La kelnero uzis sian tutan lingvoscion: li parolis rumane, serbe, turke, bulgare kaj ruse,. Sed ĉiam sen sukceso. La fremdulo ne komprenis eĉ unu vorton. Mi alproksimiĝis kun deziro helpi. Krom la rumana mi parolas sep lingvojn kaj mi demandis lin germane, france, angle, itale, hungare, hispane kaj greke. Ĉio vane. La fremdulo komprenis nenion el dek du lingvoj. Tiam mi ekmemoris artikolon pri Esperanto, kiun mi legis antaŭ kelka tempo en gazeto, sed al kiu mi tiam ne turnis atenton kaj mi finis klopodon per la demando: „Ĉu vi parolas esperante?“

„Jes, mi parolas,“ li respondis kun ĝojkrio. Kaj li daŭris per lingvo, kiun mi tute ne komprenis, ĉar tiu dirita frazo estis la sola frazo en Esperanto, kiun mi konis. Kaj kiam la fremdulo rimarkis, ke mi komprenas nenion, li sciis bonas rimedon – li donis al mi „ŝlosilon de Esperanto“, kiu ekzistas en multaj lingvoj. Kvankam ĝi estis nur malgranda kajereto, ĝi enhavis la tutan gramatikon kaj sufiĉan vortaron de la internacia lingvo.

Mi tuj komencis studi la libreton kaj post dek horoj, kiam ni estis jam sur ferdeko de ŝipo, mi jam povis paroli per Esperanto. Mi kaptis informon, ke mia kunvojaĝanto estas finno kaj scias kvar lingvojn – svedan, danan, norvegan kaj finnan. Ni tri – la finno, la kelnero kaj mi – parolis kune dek ses lingvojn, kaj tio tamen ne sufiĉis por ke ni komprenu unu la alian.

De tiu tempo mi estas fervora esperantisto.

Ero el la libro „Modernaj Robinzonoj en la siberia praarbo“

Dro. Teodoro Schwartz 1924

La maljuna araĉono montris la lertan, artifikan buĉmanieron. Preninte hakilon, ŝtelirante li alproksimiĝis kaj haltis malantaŭ la cervo. La cervo staris milde, per siaj senkulpaj okuloj ĝi rigardis nin kiel amikon kaj eĉ ne suspektis, ke ĝia vivo tuj finiĝos. La maljunulo per la malakra rando de la hakilo frapis tute malforte la kapon de la cervo. Verŝajne li trafis la oblongan cerbon, ĉar la cervo tuj falis kaj mortis. Kvazaŭ vulturoj al kadavro, tiel parto de ĉeestantoj atakis la mortintan cervon. Ili suĉis la sangon kaj ne kuiris, sed tuj krude ekmanĝis la karnon. Mi neniam imagis, ke la homoj, se la sociaj katenoj iomete malligiĝas, tiagrade fariĝas bestaj. Sur la dispecigita cervo montris al mi araĉono, kial la cervoj ne povas longe kuri dum somero. La nazo de la mortinta cervo estis plena de parazitoj, kiuj malhelpas la spiradon. Dum vintro la parazitoj ne povas rezisti la malvarmon kaj pereas. Tial povas kuregi la cervo vintre. Ĝi faras tage po 100-120 verstoj. Ni vane petis, ke ili pruntedonu al ni cervojn ĝis la rivero Vitim; ili ne konsentis, ĉar laŭ ili la cervoj ne taŭgas somere por la longdaŭra vojaĝo. Nur la maljuna araĉono montriĝis ema veni kun ni kiel gvidanto, kiam ni promesis, ke ni donacos al li nian tendon.

Je la sekvinta tago, frumatene li vere estis preta gvidi nin. Li kunprenis nur tri faritajn el cervfelo pantoflojn.

„Ete sufiĉos sur la vojo,“ li diris araĉone. Li ekiris kaj la karavano sekvis la maljunulon.

Ankaŭ tiun ĉi libron vi povas legi en ĉeĥa traduko de J.Drahotová.

Ero el la libro „Maskerado ĉirkaŭ la morto“

Tivadar Soros.

La 12-an de januaro 1945

Jam estis tria tago, kiam ni ne forlasis la domon, kaj la plejparton de nia tempo, escepte la aerumadon sur la korto, ni pasigis en la ĉambro. Ni estis vestitaj pli varme ol kutime, kvazaŭ ni ekirus por skii, ĉar tra la fenestro forte influis la malvarmo. El la direkto de la strato estis aŭdebla ofta klakado de peza maŝinpafilo. Por legi ni ne havis emon. Sed por la meditado ni havis multege da tempo. Tiu militstato, en kiu ni vivis ekde la invado de la germanoj, ŝanĝis mian sentomondon. Tio, ke mi vivis kiel persekutato, iom post iom pliintensigis mian kunsentemon: la afero de ĉiu persekutato fariĝis ankaŭ mia afero. Pro la kruela traktmaniero de la japana registraro hontis *mi*; la gravaj dekretoj aplikataj kontraŭ la sudafrikaj negroj ofendis ankaŭ *min*. Kvazaŭ mi sentus min respondeca por la tuta mondo. Estas la hodiaŭa restaĵo de tiu sento, kio devigas min transdoni mian sidlokon al maljuna negrino en la troŝtopita Subway, se ŝi aspektas laca; aŭ se mi aŭdas historieton, en kiu mi trovas spontanegan manifestiĝon de boneco, miaj okuloj tuj pleniĝas de larmoj.

La malamo neniam kaptis min. La hitlerismo pereigis multajn el miaj karaj amikoj kaj du miajn fratojn. Sed la hitlerismon mi ne povis identigi kun la germana popolo. Mi provis eduki ankaŭ miajn filojn en tia spirito.

Kvazaŭ la sorto volus elprovi mian sintenon en tiu tago, el la direkto de nia banĉambro aŭdiĝis laŭta ekkrako. Kio okazis? Unu el miaj filoj enrigardis kaj ekscitite raportis:

„Germana soldato estas en la banĉambro.“

Ni ĉiuj eniris. Tie staris bluokula, blonda, germana knabo en plena milita ekipaĵo. Eĉ barblanugojn li ne havis sur la mentono.

La fenestro de la banĉambro, kiu havis ne travideblan vitron, neniam estis malfermita. Nun ĝi staris malfermita.

La hazardo aranĝis tiel, ke tiu ĉi germana soldateto, kiel reprezentanto de la germana potenco, nun trovis sin antaŭ kvar judoj, kiuj nun havis la eblon trakti lin kun la samaj barbareco kaj sensenca malicego, kiel la germanoj traktis milionojn el la judaro.

Kun siaj bluaj okuloj kaj blondaj haroj li ŝajnis enkorpiĝo de tiu arjeco, kies fanatikuloj volis sklavigi popolojn, ekstremitasojn. Ĉu trakti lin laŭ la taliono? Ĉu li mem estas kulpa? Ĉu licas lin puni pro ago, kiun li eble ne faris, eĉ ne aprobis? Sed ĉu la ´arjoj´ pensadis la aferon tiel skrupule?

Nu, ni faris nenion malbonan al la junulo.

„Wie alt sind Sie?“ estis mia unua demando.

„Mi estas en mia deksepa jaro,“ li respondis servoprete.

„Ĉu vi fumas?“

„Jes.“

Li ricevis cigaredon, ekbruligis ĝin, avide ekfumis. Poste li rakontis, ke antaŭ nia domo staras rusa tanko. (La pafado de ties maŝinpafilo estis aŭdebla ĉe ni.) De antaŭ rusoj li rifuĝis en la kelon de la domo, de kie li volis eliĝi. El la kelo li elrampis al la porluma ŝakto. La eksteran fenestron, kiu rigardis al la porluma korteto, li rompis, la internan li enpuŝis, kaj kun granda krakbruo li falis en nian banĉambron.

Kvaronhoron daŭris la priaŭskulto, kaj estis necese decidi, kio okazu al li.

Ŝajnis, kvazaŭ la okuloj de mia pli juna, 14-jara filo estus larmoplenaj. Kelke da cigaredoj mi enmanigis al la arja knabo kaj donis al li jenan instrukcion: „Laŭ la sama vojo, kiel vi envenis, vi devas forlasi la banĉambron.“

La knaboj ankoraŭ helpis lin sur la fenestrorandon, kaj la armita reprezentanto de la germana imperio malaperis el la teritorio de juda superregado.

Eble ankaŭ ni traktis lin krude, kiam ni transdonis lin al la sorto, donante al li nek bonajn konsilojn nek kelkajn vestopecojn, por ke transvestiĝinte civilulo, li povu forkuri de antaŭ la rusoj.

Kiel pseudokristanoj, ni ne atingis tiun kristanan alton, ke kiu surĵetas vin per ŝtono, tiun vi resurĵetu per pano.

Ni konversaciis pri la sorto de germanaro. Kia kruta vojo kondukis malsupren de la Germanio de Goethe, Schiller, Beethoven, ĝis la malgranda soldato de la hitlera Germanio! Ĉe la komenco de la hitlerismo neniuj povus antaŭdiri tiun ĉi kataklismon. Eĉ Hitler mem ne.

• taliono - repago de krimo, laŭ principo de diversaj juraj sistemoj, i.a. la Mosea kaj la Romia (la t.n. lex talionis), laŭ kiu la kulpulo devas suferi tiun saman malbonon, kiun li kaŭzis: „okulon pro okulo, denton pro dento.“

Tiu ĉi valora libro estas tradukita al ĉeĥa lingvopere de J.Drahotová kaj serĉas eldoniston.

Eroj el la libro „La danĝera lingvo“

Ulrich Lins

La eksterordinaran allogon de Esperanto je progresemaĵaj spiritoj, kiu restis konsistiga parto de la japana movado, kiel ankaŭ la nedoktrinecan medion, en kiu la lingvo trovis malfermitajn pordojn, ilustras la fakto, ke grava ĝermo de radikala humanismo la „Societo de Novaj Homoj“ (Sinzinkai), fondita en 1919 de studentoj de prestiĝa Universitato de Tokio, prezentis sur la laŭvicaj titolpaĝoj de sia unua revuo, *Demokurasii* (Demokratio), la portretoj de Rousseau, Tolstoj, Marx, Kropotkin, Lincoln, Rosa Luxemburg – kaj de Zamenhof; la daŭriga revuo *Senku* (1920) portis la subtitolon *La Pioniro*. Esperanto ludis rolon ankaŭ en la unua organo de la prolet-literatura movado, *Tanemakuhito*, kiu vastanime kunigis diversajn revoluciemajn fluojn. Unu el ĝiaj fondintoj, la dramatikisto Sasaki Takamaru, ekuzigis la Esperantan subtitolon *La Semanto* por revuo ekde ĝia apero en Tokio en oktobro 1921 kaj ofte varbis en ĝi por Esperanto kiel lingva ligilo de la monda proletaro.

Paĝo 167-168.

En decembro 1954 okazis en Montevideo la Oka Ĝenerala Konferenco de Unesko. Universala Esperanto-asocio estis akceptita kiel oraganizaĵo, kun kiu Unesko havas konsultajn rilatojn. Eĉ pli grave, la Konferenco akceptis rezolucion, kiu „notas la rezultojn atingintaj per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo“ kaj „rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko“. En la voĉdono pri tiu rezolucio la delegacioj de Soveta Unio kaj ĝiaj aliancanoj surprize sindetenis.

Paĝo 479.

Oni povas konsideri progreson, ke al la homaj rajtoj lastatempe estis aldonita „rajto je komunikado“. Unesko en siaj raportoj pri nova monda inform-ordo turnas sin kontraŭ unuflanka fluo de informoj, kultura hegemonio kaj malhelpoj al komunikado. Aliflanke, en la preskaŭ 300paĝa raporto de la tiel nomata Mac-Bride-Komisiono (1980) la lingva problemo ricevas pritrakton sur malpli ol sep paĝoj. Ankaŭ Unesko ne volas riski, ke ofendiĝu la registaroj pro deklaroj pri la lingva aspekto de la internacia komunikado, kiuj estus pli ol nun tute ĝeneralaj. Sed espero restas: Esperanto vivas. Ĝia ekzisto servas kiel admono, ke en teknike kuntiriĝanta kaj pli kaj pli raciigita mondo la pli bona kompreniĝo inter la homoj ne bezonas esti utopio

Paĝo 531.

La libron en la ĉeĥa traduko vi povas legi sur paĝoj www.esperanto.wz.cz kaj www.mlboleslav.cz/esperanto. La libro enhavas historion de ĉeĥa E – movado ĝis la jaro 1986 en parto 8..

Eretoj el la lernolibro, vere rekomendinda por perfektigi la lingvoscion,

„LA TUTA ESPERANTO“

Henrik Seppik

Skeptika vilaĝanino

Maljuna vilaĝanino venis al Moskvo. Kun granda intereso ŝi rigardis la urbon kaj admiris aŭtomobilojn kaj tramojn, ĉar la unuan fojon en sia vivo ŝi estis en granda urbo.

Interalie ŝi vizitis ankaŭ la bestan ĝardenon, kie ŝi vidis diversajn, strangajn bestojn, kiajn ŝi neniam antaŭe vidis. Kiam ŝi fine venis al loko, kie estis du ĝirafoj kun longegaj koloj, ŝi ne povis plu teni sin kaj ekkriis indigne: „Tio estas trompo! Tiaj bestoj ne povas ekzisti!“

Poste oni montris al ŝi kamelon. Kiam la simpla maljunulino ekvidis tiun malbelan beston, ŝi tuj kraĉis kaj kriis: „Ho, tiuj komunistoj! Kion ili faris el la ĉevalo!“

24. La karaktero de la radikoj

Ekzistas teorio, ke tiuj radikoj, kiuj ne estas uzeblaj sen gramatika finaĵo (ekz. cigar, jun, skrib) per si mem estas nek substantivoj, nek adjektivoj, nek verboj, sed fariĝas tiuj nur post almeto de koncerna finaĵo. Kiam ni almetas al ili la finaĵon „o“, ili fariĝas substantivoj (cigaro, juno, skribo), kun „a“ ili estas adjektivoj (cigara, juna, skriba), kun „e“ adverboj (cigare, june, skribe) kaj kun verba finaĵo ili fariĝas verboj.

Sed tiu ĉi teorio apartigus Esperanton de ĉiuj aliaj lingvoj, kie ĉiu radiko havas certan karakteron, kaj pro tio senbezone malfaciligus ĝian lernadon kaj uzadon. Ĝi kontraŭas ankaŭ nian lingvo-senton: aŭdante, aŭ vidante la radikon „cigar“, ni ne pensas pri kvalito, ago aŭ maniero, sed antaŭ niaj okuloj klare prezentiĝas konkreta objekto; la radiko „jun“ elvokas en ni tuj klaran imagon pri certa kvalito kaj „skrib“ impresas nin sendube kiel ago.

Kaj laste – ankaŭ la praktika lingvo-uzo, precipe la derivado, kontraŭas tiun ĉi hipotezon: la substantivaj kaj adjektivaj radikoj estas nur malofte uzeblaj kun verba finaĵo, kaj ni havas afiksojn, kiuj povas esti uzataj nur kun substantivoj (bo-, ge-, eks-, -ano, -aĉjo, -njo, -estro, -ido, -ino, -aro, -ero, -ingo, -ujo), nur kun verboj (dis-, mis-, ek-, re-, -ado, -ilo,, -ema, -ebla, -inda) aŭ kun adjektivoj (-eco, -ulo).

25. Patro, patra, patre

Per simpla interŝanĝo de gramatika finaĵo oni povas transporti la vortojn en unu vortklaso en alian, kiel okazas ankaŭ en la naciaj lingvoj, kvankam ne tiel regule kiel en Esperanto. Tiamaniere oni povas el ĉiu substantivo devenigi adjektivon (per la finaĵo -a) kaj adverbo (-e): patro – patra – patre; homo – homa – home; knabo – knaba – knabe; letero – letera – letere; ŝipo – ŝipa – ŝipe; buŝo – buŝa – buŝe; maŝino – maŝina – maŝine; k.t.p.

Vortoj de William Auld

Esperanto signifas por mi...

Esperanto estas sola lingvo, per kiu mi povas senĝene (kaj sur egala neŭtrala bazo) interŝanĝi ideojn kaj spertojn – ĉu parole, ĉu skribe – kun homoj en la tuta mondo.

Se mi volas uzi, tiucele, mian denaskan lingvon – la anglan – mi estas ĝenata per regionaj dialektoj kaj per fakto, ke fremdlandano ne posedas la anglan sufiĉe bone, por kompreni, se mi parolas normale, tio estas: rapide kaj idiotisme. Mi tro konscias pri lia lingva malsupereco.

Se mi volas uzi, tiucele, la lernitan francan lingvon, mi estas ĝenata per mia stumbla, tre malperfekta posedo de tiu lingvo, per mia ne-indiĝena prononcado kaj per la limoj de mia vortara stoko. Mi tro konscias pri mia lingva malsupereco.

Kiam mi uzas, tiucele, Esperanton, ni ambaŭ uzas lingvon „fremdan“, do, ni renkontiĝas sen lingvaj antaŭjuĝoj. Cetere, Esperanto estas

la sola lingvo, kiun ĉiuj personoj kapablas alproprigi perfekte (se ili tion nur deziras), pro la fakto, ke ĝi estas – kompare kun ĉiuj aliaj lingvoj – pli facila kaj antaŭ ĉio regula.

Pere de Esperanto mi povas konstati proprasperte, ke la homoj ĉie estas homoj. Esperanto estas la sola, vere efika ŝlosilo al internacia amikeco kaj interkompreniĝo. Bona volo kaj bona intenco kapablas multon; sed nur komuna lingvo ebligas fundan intimecon.

Esperanto estas ankaŭ la lingvo de mia krea verkado, la esprimilo de miaj espero kaj kredoj.

Vortoj de Marjorie Boulton

Esperanto signifas por mi...

Por mi Esperanto signifas lingvon, kiu povas iom helpi al amikeco inter diversaj nacioj kaj tiel al tiu paco, kiun ni ĉiuj deziras.

Esperanto signifas lingvon, kiu jam havas propran riĉan literaturon kaj kiu peras kulturojn de popoloj al popoloj. Esperanto signifas lingvon, kiu – detruante la lingvajn barilojn – ankaŭ povos ŝpari por la homaro multan monon, kiun oni do povus disponigi alimaniere, ekzemple por hospitaloj, lernejoj, teatroj, muzeoj, sportejoj, parkoj...

Sed Esperanto signifas tion kaj tion kaj ankaŭ tion al ĉiuj inteligentaj homoj, kiuj scias pri ĝi, kiuj lernis ĝin. Al mi Esperanto signifas ankaŭ lingvon, per kiu mi trovis multajn tre karajn geamikojn, kun kiuj mi povas paroli pli libere kaj pli nature ol kun multaj britoj. Dum vojaĝoj en diversaj Eŭropaj landoj kaj en Usono mi trovis multajn varmajn korojn kaj gastamajn

hejmojn inter esperantistoj. Pere de Esperanto mi vidis multon en la mondo, kion alimaniere mi ne povus vidi, ekster la kadro de nura turismo mi vidis familiajn vivo-stilojn, malantaŭ propagandaj fasadoj mi vidis partojn de la reala vivo, super la mitoj kaj superstiĉoj pri raso kaj nacio mi trovis korojn de homj en multaj landoj.

Tamen, por mi persone plej grava estis mia stranga vivo kiel poeto en Esperanto, mi trovis novan poetan personecon, pli kuraĝan, pli sinceran kaj eble pli profundan, ol mi trovis antaŭe, en la angla. Tiel Esperanto, iasence, donis al mi – dum kriza sezono en mia interna vivo – mian propran animon.

Vortoj de Antanas Grinceviĉiun

el Litova Stelo 4 (134) / 2000.

Iam ne-esperantistoj demandas, kiom al mi donas Esperanto? Ĉu mi havas ian profiton? Esperanto ne alportis al mi ajnan materialan riĉaĵon, tamen ĝi influis mian spiritan mondon. Esperanto ne estas ordinara lingvo. Ĝi detruas murojn ne nur inter popoloj, sed tiujn ankaŭ en niaj koroj, en nia pensado. Se danke al Esperanto mi fariĝis almenaŭ iomete pli tolerema al homoj de aliaj nacieco, religio, raso, ĉu tio estas malmulte kaj senvalore? Mi kredas, ke almenaŭ pro tio mia longdaŭra reveno al nia lingvo ne estas senseca.

Vortoj de Edmund Privat „Pri Esperanta literaturo“ 1912.

Esperanto ne estas propono: ĝi estas fakto!

Esperanton ni neniam konsideru kiel proponatan aferon. Ĉesu tiaj paroloj, kiaj „se Esperanto sukcesos...“ aŭ „kiam Esperanto estos starigita...“

Jam sukcesis Esperanto, ĉar ĝi vivas, jam ĝi estas starigita, ĉar ĝi uziĝas.

Ni ĉesu proponi, ĉar proponante oni ne facile konvinkas.

Ni agu pli kaj pli, ni uzu la lingvon ĉiumaniere. Ni florigu kaj kreskigu nian rondon, kvazaŭ modelon por tuta mondo.

Ne propagandu per petegoj al la homoj, ke ili bonvolu lerni Esperanton. Ofte ni lasu la homojn kaj mem laboradu en nia mondeto, uzante Esperanton kaj kiam ni turnas nin al publiko, tiam ni estu modestaj, sed iom fieraj kaj ne faru petegojn, sed simple – kaj sengrandige – ni montru, kiel bone funkciadas Esperanto, kiel bele ĝi vivas (... ..)

Eĉ ne timu komprenigi al homoj, ke ilin Esperanto tute ne bezonas, ĉar sen ili ĝi jam tre bone sukcesis.

Vortoj de Valo

Unua novembro

Floroj, multaj floroj. Belegaj krizantemoj, kaj aliaj. Ĉe la piedo de la muroj de tombejo, aŭtoj en longaj vicoj. Homoj gravmienaj, riĉaj kaj malriĉaj, portas bukedojn aŭ florpotojn. La kulto al kadavro, verve primokita de nia kormemora Lanti, konservas siajn fidelulojn.

La florvendistoj aŝiŝis: „Donacu florojn al tiuj, kiuj ne plu estas“. Traduko: al tiuj, kiuj ne havas okulojn por ilin vidi nek nazon por ilin flari. Tiuj honorindaj komercistoj, cetere, estas simpatiaj, same kiel la kultivistoj de florgardenoj, artaj laboristoj. Ili meritas vivi per sia laboro. Ni do aĉetu florojn – sed por ilin donaci al vivantoj, vid- kaj flar-kapablaj, kiuj scipovas ilin apreci.

Mi neniam iras al tomboj de miaj gepatroj, geavoj, geonkloj, de mia kuzo mortigita ĉe Verduno, de mia juna kuzino viktimo de aŭtoakcidento, de miaj (multaj) forpasintaj geamikoj – sed pri ĉiuj mi fidele gardas la memoron. Mi deziras, ke miaj amatoj same ne vizitu mian tombon. Mi scias, ke ili gardos mian memoron en sia menso, aŭ, kiel oni diras, en sia koro. Jen estas la sola pluvivado, al kiu mi aspiras.

Cetere, mi trovas bone, ke ili memoru pri mi, sed dezirinde, ke ili plu pensu pri siaj idoj kaj estontaj posteuloj. Utila estas la memoro pri la spertoj en pasintaj tempoj, sed necesas vivi en la nuna, kaj turni sian penson precipe al estonteco.

Mi persistas kaj subskribas

Kelkaj amikoj legantoj estis ŝokitaj pro miaj kredkonfesoj ateista kaj sennaciista. Tia mi estis en 1914, tia mi restas en 1990. Oni diras: nur stultuloj ne aliĝas. Do mi estas stulta, mi konsentas. Mi estas maljuna ripetaĉulo. Mi do ripetaĉas:

„Mi estas ateisto, ĉar ne ekzistas Dio nek dioj.

Mi estas kontraŭreligia, ĉar la religioj naskas fanatikon, kiu estas fonto de krimoj. Inkluzive naciismon, etnismon, patriotismon, marksismon-leninisman, kiuj estas ja religioj.

Mi estas sennaciisto, kaj aspiras al sennacieca kulturo, kiu esprimata per la lingvo internacia, sin nutros el la naciaj kulturoj, kiel, ekzemple, la franca kulturo estas nutrita el la grek-latina, la jud-kristana kaj kelkaj aliaj. Tiel ĝi estos nek sensuka nek senkolora, sed male bunta kaj riĉa.“

Finfine, mi estas maljuna ateisto kaj sennaciisto, tro maljuna por nun evolui. Krom ĉiam ebla frenezigo aŭ menskadukiĝo, mi restos tia ĝis mia morto.

Rajmundo Laval (pseŭdonome Valo) naskiĝis en 1900 en suda Francio. Li eklernis Esperanton en 1912. Inĝeniero. Amiko de R. Schwartz kaj Lanti. Verkis multe por Sennacieca Revuo, Sennaciulo kaj Laŭte!

Lia vivo finiĝis antaŭ la jaro 2000.

Vortoj de Ludoviko Zamenhof

„Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj. ... Ĉiajn idealojn kaj celadojn gente-naciajn mi rigardas nur kiel grupan egoismon kaj hommalamon, kiuj pli aŭ malpli frue devas malaperi, kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo. ... Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj ... , ke ĉiu homo havas rajton paroli kian lingvon li volas, ... konfesi kian religion li volas, sed en komuniĝado kun homoj de alia deveno li devas, kiom ĝi ebla, uzadi lingvon neŭtrale homan. Ĉiun celadon de unu homo, altrudi al aliaj homoj sian lingvon aŭ religion, mi rigardas kiel barbarecon. ... Mia religio mi nomas tiun religion, en kiu mi naskiĝis, aŭ al kiu mi estas oficiale alskribita; sed al ĝia nomo mi devas ĉiam aldoni la nomon „hilelista“, por montri, ke mi konfesas ĝin laŭ la religiaj principoj de la hilelismo, kiuj konsistas el jeno:

- sub la nomo „Dio“ mi komprenas tiun al mi nekompreneblan plej altan Forton, kiu regas la mondon, kaj kies esencon mi havas la rajton klarigi al mi tiel, kiel diktas al mi mia saĝo kaj koro.

- kiel fundamentan leĝon de mia religio mi rigardas la regulon „agu kun aliaj tial, kiel vi deziras, ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco“ ...

- mi konscias, ke ĉiu homo apartenas al tiu aŭ alia tradicia religio ne tial, ke ĝi la plej multe respondas al liaj personaj konvinkoj, sed nur tial, ke li en ĝi naskiĝis, kaj ke la esenco de ĉiuj religioj estas la sama; ... Tial mi konscias, ke oni neniun povas laŭdi nek mallaŭdi por lia tradicia religio, kaj ke bonaj aŭ malbonaj agoj de homo dependas ne de lia religio, sed nur de li mem kaj de la cirkostancoj de lia vivo.“

El la libro „La homo, kiu defiis Babelon“

René Centassi – Henri Mason, L Harmattan 2001

La libro estas havebla en ĉeĥa lingvo. Petu ĉe drahotova@esperanto.cz